

Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Novembro-Decembro 2016 | n-ro 11-12 (1337-1338)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Kvankam floroj floras

En urboj, sur kiujn falis nukleaĵoj,
same kiel la antaŭaj jaroj venas printempo.
En urboj solecaj sen la loĝantaro,
tamen arboj kaj herboj floras.

Kvankam floroj floras, kvankam floroj floras,
nenie troviĝas homoj,
kiuj ĝuas printempon.

Sur la tero, kiu vomas venenaĵojn,
floroj velkas kun afliktiĝo kaj kolero.
Pri la homoj forpelitaj en fremdajn lokojn
havas neniun intereson orgia Tokio.
Ĉu ĝi ne havas kompaton al ili,
kvankam elektro, kiun ĝi uzas,
kaŭzis la tragedion?

Kvankam floroj floras, kvankam floroj floras,...

Unu jaron, du jarojn, kvin jarojn kaj dek jarojn,
pro veneno neniam malaperanta la loĝantoj ne povas reveni.

Songante pri hejmaj floroj,
ĉu ili devas atendi sian finan tagon en fremdaj lokoj?

Kvankam floroj floras, kvankam floroj floras,...



AOKI FUMIO

Versio far HORI Jasuo de la poemo Hanaŭa Sakedomo.

Hejme floras certe sed ...

“Hejme floras certe sed ...” estas Esperanta versio de la originale japana kanto “Hanaŭa Sakedomo” pri homoj dispelitaj de siaj hejmoj pro la akcidento en la nuklea centralo N-ro 1 de Fukuŝima post la granda tertremo en Nordorienta Japanio en la 11-a de marto 2011.

La kanton poemverkis, komponis kaj kantas la muzikgrupo Kageboushi (Esperante: Silueto), kiu konsistas el 4 viroj loĝantaj en Jamagata — gubernio najbara al Fukuŝima, sed ne trafita de la akcidento. La kanto temas pri la koro de homoj, kiuj pro registara ordono ne povas reveni al sia hejmloko post la akcidento. Ĝi kortuŝis multajn homojn.

Por diskonigi la kanton, la grupo lanĉis la projekton inviti multajn aliajn muzikistojn en Japanio kanti ĝin. Iu proponis kaj faris la anglan version. Mi partoprenis en la projekto por Esperanta versio. Mi kunordigis miajn geamikojn, kiuj aŭ esperantigis la poemon aŭ kantis la kanton kun muzikiloj.

Bonvolu aŭskulti la kanton en la jenaj Youtube-filmetoj. Bonvolu vidi kiel trafitaj lokoj aspektas hodiaŭ:

- https://youtu.be/GxzeC2_ars0 (kantado en Esperanto)
- <https://youtu.be/xqNN4Juc8Ag> (karaoke-versio sen kantado)
- <https://youtu.be/5Vd8owCwSTM> (originala versio en la japana)

Bonvolu disvastigi ĉi tiun kanton al homoj ĉirkaŭ vi. Vi ankaŭ rajtas traduki kaj kanti ĝin en via propra lingvo. Ni ne forgesu la katastrofon de la nuklea centralo de Fukuŝima.

YAMAKAWA SETSUKO



Karaj legantoj,

Jen novembra-decembra numero de Sennaciulo, kiu fakte estis finkorektita en januaro. Ni daŭre kuntrenas la malfruon akumulitan dum la somero. Al la redaktaj malfacilaĵoj aldoniĝis administra komplikajo kun la poŝto. Pro ŝanĝo en la reguloj por formatigo de la adreslisto, pri kiu ni ne tuj eksciis, en la adreslisto por la numero 7-8 elfalis familinomoj. La numeroj revenintaj al la SAT-sidejo estis resenditaj per apartaj unuopaj kovertoj kun poŝtmarkoj, kiel kelkaj el vi rimarkis, foje kun surprizo. La kaŭzoj de la problemo estis komprenitaj okaze de interŝanĝoj kun la presisto dum la ekspedo de la numero 9-10. El tio rezultis plia prokrasto, sed fine la numero 9-10 estis ekspedita kun uzeblaj adresoj.

Fronte al ĉiuj tiuj malfacilaĵoj, indas tamen substreki, ke ni tute ne spertis mankon pri materialo. Pri tio la kontribuantoj estu aparte dankataj, kaj kuraĝigitaj plu nutri la diversajn rubrikojn per diversaj vidpunktoj. Sennaciulo ja estas tia, kia SAT-anoj kaj eksteraj kontribuantoj faras ĝin.

Agrablan kaj verko-stimulan legadon deziras al vi
La redaktoskipo

Venontaj limdatoj

Sennaciulo 3-4 (1341-1342) : 20a de februaro

Sennaciulo 5-6 (1343-1344) : 20a de aprilo

Kotizoj 2017

Ne forgesu pagi akurate vian kotizon 2017. Bonvolu trarigardi la tarifon sur la paĝo 30. Se viaj adreso, retadreso aŭ aliaj kontaktinformoj ŝanĝiĝis, bonvolu sendi la informojn al financoj@satesperanto.org aŭ perpoŝte al SAT-ESPERANTO, 67 avenue Gambetta, FR-75020 PARIS, Francio. Krome, ni invitas vin pripensi la eblon starigi aŭtomatajn ĝirojn al nia konto por eviti forgeson pri repagoj, kaj faciligi la administran laboron.

Kovrilpaĝa bildo: Subĉiela banejo en nia venonta kongresejo

Enhavo

Enhavo

TRA LA MONDO

- 4 En Okcidento nian mezan klason oni nomus mizeruloj
- 5 Kie vivas la plej feliĉaj popoloj? MIR-KO
- 7 Pri migrantoj kaj rifuĝantoj : Jen nula libro XAVI ALCALDE
- 10 Pjongjango por dialogo, Seulo por jankiaj raketoj
- 11 Emblemoj sur la uniformo URTZI URRUTIKOETXEA
- 12 Novaĵoj el Francio PETRO LEVI

SINDIKATISMO TUTMONDA

- 13 Turkio: gazetara libereco estas esenca por la demokratio, liberigu la ĵurnalistojn! LABOURSTART
- 14 Liberio: reenpostenigu la sindikatanojn, respektu la sindikatan rajton LABOURSTART
- 14 Sud-Koreio: liberigu la enprizonigitajn sindikatanojn, respektu la laboristajn rajtojn LABOURSTART

EKOLOGIO KAJ MEDIPROTEKTADO

- 15 Ni ne plu ripetigu nukleajn akcidentojn HORI JASUO
- 16 Kio estas la situacio de Fukuŝima ? HORI JASUO
- 17 Kamparaj movadoj organiziĝas kontraŭ la agrikultura industrio kaj la Genetike Modifitaj Organismoj NENIAM MILITO INTER NI

BELETRO

- 2 Hejme floras certe sed ... YAMAKAWA SETSUKO
- 2 Kvankam floroj floras AOKI FUMIO
- 18 Malserena translokiĝo ROGER CONDON
- 20 La varma karno de l' vortoj (2) RAYMOND QUENEAU
- 20 Pri poezio PETRO LEVI

INTELEKTA MEMDEFENDO

- 21 Ni ekstermu la konspirteoriojn! ROLAND PLATTEAU

LABORISTA HISTORIO

- 22 Sykes-Picot URTZI URRUTIKOETXEA
- 23 Reago al la recenzo *La bunteco de anarkiismo en Hispanio* (2) MIGUEL FERNÁNDEZ
- 25 Operacio "Neimageblo" VIKTOR MEDNIKOV
- 26 Franjo Vokoun RADENKO MILOŠEVIĆ
- 27 Bela stratribelo NIKOLAO ARRATZ

NEKROLOGO

- 28 Friedel Bues HANS RODEWIG
- 28 Henriko Graven

EL LA LETERKESTO

- 29 Kiu ekmilitadas aŭ preparas pacon? MICHEL MARKO
- 29 Pri antisemitismo IAN FANTOM

SAT-ANOJ AKTIVAS

- 31 SAT-kunsido en Japanio NAKAMURA DAISHIN
- 31 Vizito al Saĥaleno MIYAZAWA NAOTO
- 31 La liberpensula frakcio DOMINIKO SIMEONE

EL LA SAT-ADMINISTREJO

- 17 Novaj aliĝoj
- 30 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Donacoj

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendadas. Kontribuojn sendu al:
sennaciulo.redaktejo@gmail.com

En Okcidento nian mezan klason oni nomus mizeruloj

Doktoro de ekonomio, entreprenisto kaj sindikata aganto, Ilgarts Zeyberts dum ioma tempo antaŭe pro siaj akraj eldiroj en periodaĵoj fariĝis cel-punkto de la sekureca polico.

Hodiaŭ, ne timante ripetajn akuzojn, li malkaŝe rakontis al nia ĵurnalo *Subbota* pri tio, kio okazas en Latvio. Kial ĉio estas tiom malbona kaj ĉu estas lumo en la fino de la tunelo.

— Kiam okazis “atmoda” [*], ni ĉiuj kredis pri pliboniĝo. Eĉ mia najbarino, latvino, pensiulino ekde sovetunia tempo. Ŝiaj okuloj brilis, kaj ŝi ripetadis: “Ni iradu eĉ en bastaj ŝuoj, sed ni mem konstruos nian vivon laŭ propra scipovo”. Kaj nun tiu virino ploras: “Mi estis homo, sed nun mi estas mizerulino”. Ŝi diras, ke “dum USSR estis pli multe da justeco ol nun. Tamen, per pensio mi povis travivi ne malsatante”.

Pasis jam 25 jaroj, kaj 5% de loĝantaro el la superaj tavoloj, enkotiĝintaj en korupto, ne scias, je kio elspezi sian ŝtelitan monon, sed 80% da homoj estas klasikaj malriĉuloj. En Okcidento oni nomus plimulton de niaj homoj mizeruloj aŭ malhavuloj, por kiuj alireblas nek medicino, nek klerigo, nek normala vivmaniero.



Valdis Keris

Tute baldaŭ venos ankoraŭ pli malbonaj tempoj. Jam en la jaro 2018, kiam Britio eliros el EU, ni tion eksentos, ni en Latvio tion spertos. Buĝeto de EU malgrandiĝos je unu triono. Tio signifas, ke ankaŭ Latvio perdos trionon de siaj eŭrofondusoj jam en la jaro 2018. Tiu triono proksimume egalas al 360-380 milionoj da eŭroj.

Latvio staras en la unua loko en EU laŭ kvanto da invalidoj. Kaj tio egalas al 19 000 jare! Sed tio ja estas sekvo de malalireblo al nia medicino.

Kial Finnlando kaj Svedio mankas en NATO? Ili malkaŝe diras, ke ili ne bezonas investi milionojn por armeo kaj armilaro, sed estas pli bone investi tiun monon por normalaj rilatoj kun Rusio. Tiaj ĉi landoj praktike ne havas armeon, nur marbordan gardon kaj kontrolon de la aera spaco. Tamen, ĉiuj havenoj plen-plenas de rusiaj ŝipoj – ili tie estas konstruataj aŭ riparataj. Kaj en tiujn landojn fluas mono de Rusio.

Formiĝas tia impresoj, ke la tasko de niaj politikistoj estas unu: kiel eble plej rapide liberiĝi de malhavuloj kaj pensiuloj. Se ili havos malpli da mono, tiam ili pli baldaŭ mortos.

— Ĉu vi rimarkis, kiel lastatempe fortiĝis la rolo de la sekureca polico?

— Tio ja ne okazis sencele! Post la Unuamaja manifestacio oni nin, gvidantojn de sindikatoj, kiuj subskribis la memorandon pri socialaj postuloj, tuj vokis al la polico de sekureco. Kaj komencis sur nin premado. Ni diris al ili: ni

ja ne alvokas al renverso de regpovo en la lando. Tamen ni havas rajton eldiri nian malkontenton pri tio, kio okazas en la lando.

La sekureca polico tenis nin dum 3 horoj. Kaj sola, kiu konfesis tion, ke li tie estis esplordemandita fare de la polico de sekureco, estis gvidanto de medicinista sindikato Valdis Keris. Aliaj ektimis, ĉar la ĉantaĝo estis tre forta. Al la aktivuloj la policanoj rekte diris: se vi ankoraŭfoje tiel faros, ni elĵetos membrojn de viaj familioj el ŝtataj entreprenoj; ili kaj vi mem trafos en nigrajn listojn, kaj laboron vi ne plu trovos. Kaj kiel vi vivtenos viajn familiojn – tio estas viaj problemoj. Post tia ĉi “konversacio” plimulto el la arestitaj diris: ĉio, mi ne plu ion bezonas, donu al mi eblecon labori ĝis la pensio.

Sed kie do estas la punkto 100 de la Konstitucio, kie estas skribita pri rajto de liberesprimo kaj de elekto por ĉiu civitano? Post tio ĉi, Valdis Keris ĝuste diris: ĉe ni ne estas demokratia lando, ni poiome transformiĝas al policaĝendarma ŝtato.

Intervjuo de ĵurnalistino Olga Knazeva al sindikat-aktivulo Ilgarts Zeyberts.

El la rusa resume tradukis Andris Natinš el ĵurnalo Subbota, 17-23 de aŭgusto 2016.

[*] Latvalingva vorto, kiu signifas “vekiĝon” (NdT).

Kie vivas la plej feliĉaj popoloj?

Difino de feliĉo

Feliĉo estas malklarkontura koncepto kaj povas signifi multajn malsamajn aĵojn por multaj homoj. Feliĉo estas mensa aŭ emocia stato de bonfarto, difinita per pozitivaj aŭ plaĉaj emocioj irantaj de kontenteco ĝis intensa ĝojo. Feliĉaj mensaj statoj ankaŭ povas reflekti juĝojn de persono pri sia totala bonfarto, bonŝanco, vivokvalito aŭ prosperado. Unuiĝintaj Nacioj deklaris la 20-an de marto kiel la Internacian Tagon de Feliĉo por rekoni la signifon de feliĉo kaj bonfarto kiel universalaj celoj.

Gamo de biologiaj, psikologiaj, ekonomiaj, religiaj kaj filozofiaj aliroj klopodis por difini feliĉon kaj identigi ties fontojn. Diversaj esplorgrupoj, inkluzive de tiuj pri pozitiva psikologio kaj feliĉ-ekonomiko, utiligas la sciencajn metodojn al esplordemandadoj pri kio estas “feliĉo” kaj pri kiel eblas ĝin ekhavi.

Prof. Ruut Veenhoven, nederlanda sociologo, estas pioniro en la scienca studo de feliĉo en la signifo de subjektiva ĝuo de vivo. Lia laboro pri la socicirkonstancoj por homa feliĉo kontribuis al renoviĝinta intereso pri feliĉo kiel celo por publika politiko. Li

montris, ke feliĉo povas esti uzata kiel fidinda mezurilo por taksi progreson en socioj, kio estis unu el la fontoj de inspiro de Unuiĝintaj Nacioj por adopti feliĉ-iniciatojn kiel holisman aliron al evoluo. La esplorojn kaj atingojn de prof. Veenhoven, rilate al feliĉo de popoloj, la artikolo prezentas daŭrige.

Biografio de prof. Ruut Veenhoven

Ruut Veenhoven naskiĝis en Hago, Nederlando, en la jaro 1942. Li finis la Nederlandan Liceon en 1962 kaj ricevis magistran gradon en sociologio (specialiĝante pri publika administrado) de Erasmus Universitato en Roterdamo en 1969. En 1984 li gajnis sian doktorecon per la disertacio “Cirkonstancoj de feliĉo” kiu sintezis la rezultojn de empiriaj studoj pri feliĉo. Ekde 1985 li estis direktoro de *World Database of Happiness* (Monda Datumbazo de Feliĉo), kiu nun kovras 20 000 exploreltrovojn prenitajn de 3 500 empiriaj enketoj. Li estas ankaŭ la fondredaktisto de *Journal of Happiness Studies* (Revuo por Feliĉo-Studoj). De 2001 ĝis sia emeritiĝo en 2007 li instruis en Roterdamo kiel profesoro pri “Socicirkonstanco por

homa feliĉo”, kaj li nuntempe laboras en Erasmus Happiness Economics Research Organisation (Esplora Organizaĵo pri Feliĉo-Ekonomio de Erasmus Universitato). Prof. R. Veenhoven estas konsiderata kiel “la baptopatro de la feliĉo-studoj” kaj “gvida aŭtoritato pri tutmondaj laŭlandaj niveloj de feliĉo”, kies laboro “gajnis al li internacian agnoskon”.

Esploroj de prof. Ruut Veenhoven pri feliĉo

La ĉefa esplortemo de prof. Veenhoven estas feliĉo en la signifo de subjektiva ĝuo de vivo. La rezultojn de la esploroj prof. Veenhoven formulis jene:


1. Feliĉo estas universala. Ĉiuj homoj havas tendencojn por fiksi, ĝenerale, ke vivkondiĉoj kaj feliĉokondiĉoj estas similaj, sed prikonsiderante kulturajn diferencojn rilate al la konvinkoj pri feliĉo. Oni akiras feliĉon prefere el universalaj bezonoj ol dum la renkontado de kulturaj necesoj.
2. Bezonkontentigo dependas same de la viv-eblo de socio kiel de la viv-eblo de individuaj personoj.
3. Pli granda feliĉo de pli granda

Lando	Punktoj (0 - 10)
Usono	7,0
Argentino	6,8
Brazilio	6,8
Japanio	6,4
Ĉinio	6,3
Barato (Hindio)	5,7
Ganao	5,7
Egiptio	4,8
Angolo	4,3
Irako	4,3
Pakistano	4,3
Zimbabvo	3,3
Tanzanio	3,2

Tabelo 1: Feliĉo de kelkaj popoloj



Ruut Veenhoven



Feliĉo de popoloj en ĉiuj landoj de la mondo

(laŭ la studoj de Erasmus Happiness Economics Research Organization)

nombro da personoj estas ebla en nuntempaj socioj kaj povas esti "realigita", inter alie, laŭ la sekvaj manieroj: kreskigante liberecon, tiel ke homoj povas elekti la vivmanieron, kiu konvenas al ili plej bone,

- informante homojn pri efikoj de gravaj elektoj rilate al feliĉo de homoj, kiujn ili ŝatas (tio postulas grandskalajn longperspektivajn studojn),
- investante en menshigieno kaj profesiigo de vivotrejnad.

4. La atributoj de feliĉo, signalantaj ke ni bone funkcias, signifas ke estas konektoj de feliĉo kun bonaj mensa kaj fizika sano (Feliĉaj homoj vivas pli longe!).

5. Esti feliĉa agordas kun farado de bono. Pli feliĉaj homoj pliboniĝas en rilatoj, pli libervole laboras kaj estas pli interesataj pri aliaj homoj kaj ties problemoj.

Metodoj de feliĉo-mezurado

Pro tio, ke feliĉo estas la mensa stato de homa intelekto, ĝi plej konvene povas esti mezurata utiligante enketojn kaj interparolojn. La plej tipa maniero trakti ĉi aferon estas senpere demandi kiel multe la enketata persono ŝatas sian vivon. Havante multnombrajn unuopajn subjektivajn respondojn oni povas mezkvantigi

rezultojn, ricevante ĝeneraligajn nominalajn valorojn por tuta popolamaso, ekz. por landloĝantaro. Aliaj aldonaj metodoj de feliĉo-mezurado enhavas: diversspecajn detalajn demandadojn, la pritakson de agordo kaj animstato de la enketato, la analizon de alireblaj dokumentoj kaj la observadon de la (feliĉaj, vinagraj) mienoj de la enketatoj kaj iliaj kondutoj (ĝojplenaj, malgajaj). Esploroj ankaŭ konsideras ĉu feliĉo-nivelo rilatas al la enketomomento, ĉu koncernas longdaŭran tempon.

Oni akceptas, ke la valoro de feliĉo-nivelo oni nombras en la skalo de 10 punktoj, de 0 ĝis 10. La pritaksita valoro de 10 punktoj signifas, ke homo aŭ popolo estas plej feliĉa.

Feliĉo de popoloj

La Esplora Organizaĵo pri Feliĉo-Ekonomio de Erasmus Universitato senĉese studas la problemojn de popola feliĉo, kaj regule publikigas informojn de siaj atingoj. La bildo montras la relativajn feliĉo-nivelojn de ĉiuj landoj de la mondo, ekde la plej feliĉaj popoloj ĝis la malplej feliĉaj. En la tabelo 1 aperas la nombra pritakso de feliĉo de kelkaj popoloj en la skalo 0 – 10. La tabelo 2 komunigas la nombran pritakson de feliĉo de eŭropaj popoloj; la plej feliĉaj popoloj vivas en Danio (8,4), Norvegio (8,0), Svisio (8,0), Finnlando (7,9), kaj la

Lando	Punktoj (0 - 10)	Lando	Punktoj (0 - 10)
Aŭstrio	7,2	Islando	8,1
Belgio	7,2	Kroatio	6,0
Blankrusio	5,5	Latvio	5,5
Britio	7,1	Litovio	5,8
Bulgario	4,6	Luksemburgo	7,7
Ĉeĥio	6,6	Nederlando	7,6
Danio	8,4	Norvegio	8,0
Estonio	6,2	Pollando	6,8
Finnlando	7,9	Portugalio	5,8
Francio	6,4	Rumanio	6,0
Germanio	7,2	Ruslando	5,6
Grekio	6,5	Slovakio	6,3
Hispanio	7,0	Slovenio	7,0
Hungario	5,5	Svedio	7,8
Italio	6,6	Svisio	8,0
Irlando	7,5	Ukrainio	5,1

Tabelo 2: Feliĉo de eŭropaj popoloj (Meznombraj punktoj el la periodo 2005 – 2014)

Lando	Punktoj (0 – 10)
Kostariko	8,5
Danio	8,4
Meksikio	8,3
Islando	8,1
Kanado	8,0
Svisio	8,0
Norvegio	8,0
Finnlando	7,9
Kolombio	7,9
Venezuelo	7,8

Tabelo 3: La plej feliĉaj popoloj de la mondo

malplej feliĉaj loĝas en Ukrainio (5,1), Bulgario (4,6). La esplorado de la plej feliĉaj socioj pruvis, ke en la mondo oni trovas la plej feliĉajn popolojn en Kostariko, Danio kaj Meksikio (tabelo 3).

Aliaj esploroj pri feliĉo

La Esplora Organizaĵo pri Feliĉ-Ekonomio de Erasmus Universitato publikigis en siaj eldonaĵoj multajn konstatojn rilatantajn al feliĉo de personoj kaj popoloj, sciigante inter alie, ke:

– feliĉaj popoloj pli zorgas pri la prospero de patrujo kaj pli engaĝiĝas al interna ŝtata politiko,

– ju pli multe ni estas feliĉaj, des pli multe ni timas la virtualajn minacojn, kiuj povas detrui nian feliĉon,

– la fonton de nia feliĉo ni vidas en nia inĝenio, kaj la kulpon pri malsukcesoj ni atribuas al la socio kaj al la ŝtato,

– pli da feliĉaj personoj troviĝas en la politika centro de la socio ol en ekstremaj aloj de la socio,

– la sociala helpo de ŝtato ne certigas la feliĉo-nivelon de socio,

– feliĉo de socio grandiĝas se ŝtato estas bone regata kaj bone funkcias,

– la riĉeco de lando ne ĉiam kontribuas al feliĉo de civitanoj,

– religiemaj personoj ne estas pli feliĉaj ol la nereligiemaj (nur kredantaj usonanoj estas iome pli feliĉaj); kiam la lando malprosperas, civitanoj pli ofte vizitadas preĝejon serĉante konsolon,

– bone prosperantaj landoj (ekz. Aŭstralio, Norvegio, Svisio, Usono) havas de multaj jaroj konstanta la nivelon de feliĉo,

– evoluantaj landoj plej ofte plialtiĝas sian nivelon de feliĉo, ekz., en Pollando ĝi plialtiĝis de 4,4 en la jaro 1962 ĝis 6,8 en 2016,

– la feliĉo-nivelo de unuopa persono plialtiĝas ĝis ĉirkaŭ la 25-jaraĝo, kaj post la 30-40-jaraĝo ĝi reduktiĝas, kaj, fine, post la 50-jaraĝo, ĝi plialtiĝas, farante la 60-70-aĝajn personojn ofte plej feliĉaj en disvolviĝintaj landoj,

– statistike, personoj praktikantaj kreajn kaj liberajn profesiojn (ekz. ĵurnalistoj) principe estas pli feliĉaj.

MIR-KO


Pri migrantoj kaj rifuĝantoj : Jen nula libro

La pasintan aŭguston mi estis en Francio, konkrete en Kalezo (Calais) kaj en la tuta regiono de Pas-de-Calais, inkluzive de Lille kaj ankaŭ Parizo. Mi vizitis la ĉefan kampon de rifuĝantoj, faris intervjuojn kaj parolis kun lokaj esperantistoj, kiuj donis al mi valorajn konsilojn. Mi kompletigis tiun esplorvojaĝon legante dekon da libroj pri tiu fenomeno. Dum la plimulto el ili elstaras kaj helpis al mi kompreni sufiĉe da aferoj, unu el ili ege ŝokis min. Temas pri *Les migrations pour les nuls* (2014) de Jean-Paul Gourévitch.

Laŭ la aŭtoro, la libro celas objekte kaj pedagogie klarigi temojn ofte verkitajn de ideologiaj vidpunktoj, ĉu dekstremaj, ĉu maldekstremaj. Ironie, malantaŭ la ŝajne rigora enfokusigo de la libro, la rezulto alproksimiĝas al dekstra ekstremismo. Legante ĝin, oni sentas, ke la plejparto de la migrantoj kiuj venas al Eŭropo volas precipe profiti de nia socio. Aldone, Gourévitch asertas, ke la migrado ne estas fenomeno suferata de la migrantoj sed elektita de ili, kvazaŭ tio estus krimo.

Por ŝajnigi la tekston rigora, li ege parolas pri metodologio, ĉiam emfazante la kompleksecon de la afero. Li demandas sin “ĉu individua atesto analizeblas?”, tiel kritikante la emocian dimension de la temo, kiu ne permesus vidi la statistikan realon. Simile, montrante multajn klasifojn li ŝajnigas la tekston sistema. Ili enhavas nociojn kiel antaŭnaskan (por naski siajn infanojn en Francio), gepatran (por la trafiko de beboj) aŭ socian migradon. Laŭ la aŭtoro, tiu lasta ege gravas, kvankam “oni ne rajtas konsideri ĝin kiel kialo por akcepti tiujn homojn”.


La libro prezentas Francion kiel la landon kun la plej ampleksaj sociaj



helpoj al la enmigraĵoj de Eŭropo (ĉu la aŭtoro ne scias pri la skandinavaj landoj?), kaj ankaŭ kiel “la solan landon kie, nome de ties tradicio kaj ties valoroj, la ŝtato helpas ilin superi ilian malfortikecon”. Post du semajnoj en la kampo de rifuĝantoj de Kalezo mi devas diri, ke tiaj asertoj estas ridindaj. Ili, tamen, povas trompi legantojn ne bone informitajn. En la libro estas multe da ekzemploj de tia senhonta manipulado, sed foje ĝi okazas pli subtile.

Neŭtrala, moderna kaj amuza enfokusigo

La celo estas atingi la studentojn kaj pro tio la libro ŝajnas moderna kaj amuza. Tiele, al ĉiu paragrafo aldoniĝas signo indikante ĉu la teksto temas pri objektiva fakto, anekdoto, polemika debato, nepra informo aŭ teknikaĵo. Nu, la tuto ne povus esti pli miksitaj. Ekzemple, laŭ Gourévitch, objekte estas aserti, ke fine tiuj civitanoj kiuj ne toleras plu la kunekzistadon, balotas por politikaj organizoj kiuj celas limigi la fluon de migrantoj kaj kiujn “ofte oni prezentas



kiel diablaj simple por diri, ke ili volas eradikigi tiun “tumoron”.

Laŭ alia objektiva informo, la aktivuloj kiuj defendas la rajtojn de la migrantoj kutimas geedziĝi kun ili por ke ili havu la francan naciecon. Tiu ideo (kaj alineo) finas jene: “Kaj la divorco ne nuligas la atingon de nacieco”. Kaj jen alia objektiva informo: “Longatempe paca kunekzistado ne eblas inter du kontinentoj tiel proksimaj, Eŭropo kaj Afriko”. Pro tio, laŭ la aŭtoro, objektiva fakto estas ke la franca (kaj la eŭropa) publika opinio ĉiam plendas pri plia sekureco kaj plia kontrolo.

Simile, li komentas detale (en tri paĝoj) tri “polemikojn” pri kiuj raportis la dekstrema ĵurnalo *Le Figaro* pri (migrantaj) familioj kiuj ricevis tro da socia helpo. Por ne ŝajni tro kontraŭa, la aŭtoro finas tiun epigrafon dirante ke oni devas memori, ke neniu decidas migri propravole, sed pro malespero. Jen evidenta kontraŭdiro kun sia ĝenerala mesaĝo. Kaj jen alia objektiva informo: “Kutime, la kialoj de la migrantoj ne klaras nek sinceras. Multaj azilpetoj estas fakte maskitaj ekonomiaj migradoj”. Punkto kaj nova alineo.

Alia neŭtrala kaj objektiva informo kiu legeblas en la libro estas la jena: “Longatempe, la filoj de la migrantoj, proporcie pli nombraj ol la filoj de la indiĝenoj, kreskigos la elspezojn en sano, loĝejo, socia helpo, kaj fine, eĉ la emeritaj pensioj”. Notu la leganto la daŭran perspektivon pri la kosto de la enmigrado por la indiĝena socio, kiu devas alfronti eĉ perfortajn konfliktojn, ĉar “la paca kunekzistado inter (ĉiam

pli multnombraj) infanoj de eksterlanda origino kaj la (ĉiam pli malmultnombraj) de la indiĝena loĝantaro ne estas garantiita”.

Aliflanke, ekzemplo de teknika detalo estas la kvanto de ŝtata mono, kiun kostis la moskeo de la urbeto Woippy; pri nepraj informoj, Gourévitch diras, ke “aktivaj migrantoj en Francio laŭleĝe ne estas sufiĉe nombraj por ekvilibrigi la kalkulon de enmigrado kaj integriĝo”. Fine, la ĉefrolulo de la anekdotoj estas ofte la aŭtoro mem, kiu gvidas nin inter diablaj, anĝelaj kaj realismaj proponoj ŝajnigante serĉi egalan distancon, nek por nek kontraŭ la migrantoj. Tamen, kiel atingi egalan distancon en tiu temo?

Egala distanco

En la enkonduka kaj leksikona ĉapitro, la aŭtoro klarigas, ke ĉiu vorto por paroli pri la migrantoj en neregula situacio havas apartan konotacion. Tiele, la plej neŭtrala formo estus “enmigrantoj en neregula situacio”. Aliflanke, tiuj kiuj kontraŭas ilin preferas uzi “kaŝituloj” (*clandestins*) kaj tiuj kiuj apogas ilin “senpaperuloj”. Post tiu klasifiko, ni malkovros dum la legado, ke foje la aŭtoro parolas pri *clandestins*, ni supozas, senkonscie. La sola fojo kiam li uzas “senpaperuloj” li sentas sin devigita pravigi tiun vortelekton.

Gourévitch proponas perfektan kaj perversan distingon inter la bona kaj la malbona migranto: la unua estus tiu kiu lasas sian landon ĉar li ne toleris vivi tie (t.e. rifuĝanto) kaj pro tio alvenas kun pozitiva sinteno al la gastiganta lando, pretas kompreni la aliajn kaj evolui kune. Kontraŭe, tiu kiu lasas sian landon ĉar sekvis la sirenkanton kaj kredis trovi Eldoradon en la metropolo, alvenas kun plendoj, petas rajtojn kaj ne tro zorgas pri siaj devoj al la gastiganta lando.

Laŭ tiu libro, necesas esti egalan distancon inter islamŝato kaj islamofobio. Tiurilate, Gourévitch diras, ke necesas diferencigi inter Islamo kaj islamismo, sed tuj poste li kritikas, ke ene de la maldekstro ekzistas “fascino por la islamismo”. Aldone li demandas sin ĉu Islamo kaj demokratio povas kongrui. Kaj tuj poste li bedaŭras (kiel objektiva informo), ke nuntempe oni konsideras ne deca politike levi tiujn demandojn kiuj “pridiskutas la regantan pensmanieron” kaj ke oni stigmatizas homojn nur por levi ilin.

Post menciigi malsamajn ideojn kaj por kaj kontraŭ la migrantoj, la aŭtoro kutime finas la alineon pere de objektiva (kaj drasta) konkludo, kiu estas tamen tre ideologia laŭ la jena modelo: “Kelkaj diras... kaj aliaj diras... Aliflanke, la plejparto de la migrantoj neniam integriĝas en la gastiganta socio”. Punkto kaj nova alineo. Aŭ ankaŭ: “Aliflanke, neniu esploras la malfacilaĵojn de la loĝantaro kiu devas kunekzisti kun la migrantoj”. Punkto kaj nova alineo. Estas multe da similaj ekzemploj.

Ofte li ridindigas progresemajn perspektivojn, prezentante sin mem kiel viktimojn: “Ĝis antaŭ nelonge, diskuti la regantajn ideojn de la maldekstruloj kaj de la nuntempaj politikoj kiuj privilegias la asociojn estis tabuo. Laŭ la direktoro de *Libération*, ĉiuj kiuj faras tion estas ekstremdekstruloj. Nu, ĝi ne plu estas tabua temo”. Laŭ li, la franca socio “venkis pasintajn kompleksojn kaj multaj civitanoj jam parolas pri la ekzisto de tro da Araboj aŭ diras, ke estontece Francio estos islama”. Punkto kaj nova alineo.

Foje, la sistemo estas ankoraŭ pli subtila. Ekzemple, ĉapitro komenciĝas dirante ke ne eblas kompreni la temon de la rifuĝantoj kaj migrantoj nur el kvanta vidpunkto, t.e. kalkulante la kostojn kaj la profitojn, sed necesas konsideri, ke ĉiu homo havas personan kaj traŭmatan historion, travivis komplikajn aventurojn, ktp. Post tiu frazo, venas la plej ampleksa parto de la libro, ĝuste pri la (neelteneblaj) kostoj de la enmigrado por la gastiganta lando. Jen la ĉefa mesaĝo de la libro.

En aliaj klarigoj, la pozitiva flanko de la afero venas je la fino, post longa rakonto de la negativaj aspektoj de migrado. Tiusence, modela estas la



Jean-Paul Gourévitch

kazo de la ciganoj. Post detala priskribo de ilia malbona reputacio kaj de iliaj rilatoj kun deliktado, la aŭtoro finas tiun parton jene: “Estus maljuste ne mencii, ke la ciganoj ankaŭ kontribuis kulture al nia socio, nome la flamenko aŭ la sur-strata arto”. Punkto kaj nova ĉapitro. Kaj la ne bone informita leganto ridetas pensante ke la libro juste prezentas kompletan trarigardon de la temo.

Tiu klopodo de egala distanco rimarkeblas ankaŭ en aneksita listo de citoj, kiu enhavas frapantajn frazojn kontraŭ la migrantoj fare de Sarkozy, Chirac aŭ Le Pen (Jean-Marie), kune kun aro de ĝeneralaj frazoj kontraŭ la elito, faritaj de anonimuloj, kiel “evoluhelpo signifas preni monon de la malriĉuloj de la riĉaj landoj kaj doni ĝin al la riĉuloj de la malriĉaj landoj”. Tamen, tiu listo enhavas neniun citon de konataj defendantoj de la rajtoj de la migrantoj, tiel daŭrigante konscian decidon prisilenti tiun parton de la socio.

La asocioj por la rajtoj de la migrantoj

Fakte, en la 454 paĝoj de la libro apenaŭ aperas la asocioj por la rajtoj de la migrantoj, eĉ en la lasta ĉapitro, kiam la aŭtoro klarigas dek gravajn internaciajn organizojn por ke la interesota leganto sciu pli pri tiuj temoj. Inter ili, estas nek unu asocio por la defendo de la rajtoj de la migrantoj. Tamen enestas konservativaj pensfabrikoj (*think tanks*) kiel la brita *Migrations Watch*. Aldone, kiam ili aperas, tiuj mencioj estas ambiguaj, serĉante denove egalan distancon inter la pozitiva kaj la negativa flanko de la afero.

Ekzemple, post paragrafo priskribante la lukton de Amnestio Internacia kontraŭ ĉiu formo de diskriminado, la aŭtoro kritikis la “politikan uzadon” de la kontraŭ-rasismo en polemikaj rubrikoj. Tie menciigis la ekzistado de la kontraŭ-blanka rasismo, “kutime neita de la kontraŭ-rasisma movado”. Simile, la aŭtoro diras, ke kvankam la buĝeto de tiaj asocioj estas pli strikta ol tio kion la publika opinio kredas, multaj el ili ricevas teritoriajn subvenciojn kaj donacojn de riĉaj mecenatoj. Plie, li ankaŭ kritikis ilian travideblecon.

Kaj jen mencio pri rilata socia movado: “La movado por plej justa tutmondiĝo plendas (foje perforte) por ekvilibrigi la raporton inter la Nordo kaj la Sudo”. Ĉu necesas tiu ĉi parentezo pri la perforto? Kompreneble ne. Jen la tuta informo pri tiu socia movado kiun ricevos la leganto de la libro. Fine, laŭ Gourévitch la agado de protesto de la rifuĝantoj mem estus “organizitaj *shows*”. Tiurilate, objekte informi pri la afero laŭ la aŭtoro estas aserti ke kiam ili faras malsat-strikon, atestantoj vidis ilin manĝante kaŝe.

Konklude: Jen danĝera libro

Kvankam ĝi ŝajnas banala manlibro, tiu verko danĝeras ĉar ĝi celas dissendi apartajn mesaĝojn, kiel la enorman ekonomikan koston por la franca buĝeto kiu enmigrado havas. Tiurilate, la aŭtoro diskutas la rentabilitaton de “investoj” ligitaj al la migrado, inkluzive de la evoluhelpo al la landoj de la tria mondo aŭ la subvencioj al la francaj kontraŭ-rasismaj asocioj. Aldone, la libro amplekse pritraktas malsamajn temojn, kiel impostparadizojn, prostituadon, nesekurecon aŭ la islamigon de la socio. Kune, de tiuj pripensoj profitas la ekstremdekstruloj.

Tiele, kaj sen mencii la fontojn, Gourévitch parolas pri statistikoj kiuj montras, ke la eksterlandanoj ŝajnigas sin malsanaj multe pli ofte ol la indiĝenoj. Simile, la pruvo de la rilato inter migrado kaj deliktado estus la plej alta proporcio de eksterlandanoj

en la francaj prizonoj. Kompreneble, Gourévitch neniam pensis pri eblaj rasaj antaŭjuĝoj ene de la polico aŭ en la jura sistemo aŭ pri grava korelativo inter malriĉeco kaj eta deliktado. Li neniam legis pri spertuloj parolante pri tio.

Fakte, laŭ la libro, “realismajn solvojn al la enmigrado” proponas nekonata grupo de “fakuloj pri juro” aŭ “malsamaj analizistoj” aŭ eĉ “multaj fakuloj”, kiuj hazarde rekomendas malsamajn manierojn farigi la politikon pri migrantoj pli strikta, pli subprema, kaj pli deadmona. Kontraŭe, tiuj “naivismaj solvoj” kiuj komenciĝas el la premiso ke enmigrado estas riĉeco por la gastiganta socio venas el “bonpensantaj maldekstruloj”, inter kiuj la aŭtoro mencias specife la Komunistan Partion.

Inter la strangaĵoj de la libro, surprizas la malesto de Kalezo (nur aperas Sangatte kaj nur en duono de paĝo), kvankam ĝi estas la plej konata rifuĝinta kampo en Francio. Post la legado de tiu libro mi iomete esploris pri la aŭtoro, malkovrante ke li jam verkis pseŭdosciencajn studojn pri la kostoj de la enmigrado por Francio, kiuj ege plaĉis al Marine Le Pen, nuna estro de la *Front National*, kiu ofte citis ilin en siaj diskursoj. Kun tia pasinteco, teruras pripensi kial la fama eldonejo *First* petis al li enkondukon de la temo por ĝenerala publiko.

Por tiuj kiuj volas scii pli, jen mallonga sed bonega libro pri: *Migrants & réfugiés. Réponse aux indécis, aux inquiets et aux réticents* (2016), de Claire Rodier.

XAVI ALCALDE



Kampo de rifuĝantoj ĉe Kalezo (Calais)

Pjongjango por dialogo, Seulo por jankiaj raketoj

Nord-Koreujo ĉi-lunde (15-an de aŭgusto), la 71-an datrevenon de la liberiĝo el la japana kolonia dominado, sciigis ke la reunuiĝo de la duoninsulo estas ĝia “plej granda promeso”, laŭ oficialaj komunikiloj cititaj el la najbara nacio por EFE.

“La unuiĝo estas la plej urĝa temo je vivo aŭ morto, la plej granda promeso por la tuta nacio”, tekstas la ĉefartikolo de la oficiala nordkorea ĵurnalo Rodon Sinmun. “Granda vojo ĝis la unuiĝo”, aldoniĝas la teksto.

Pjongjango pledas por la reunuiĝo de la du landoj, propono, kiun la sudkoreaj kritikantoj konsideras destinita elpeli la usonajn militfortojn el la sudo.

La nordkorea ttt DPRK Today urĝis Sud-Koreujon akcepti la proponon de la nordo komenci la dialogon kaj kritikis Seulon pro ĝia rifuzo de la intencoj de Pjongjango rekomenci la interparoladojn.

La nordkorea registaro lastatempe faris proponojn de dialogo, sed Sud-Koreujo rifuzis ilin, ĉar ĝi konsideras ke ili ne estas sinceraj, pro la nepreteco de la nordo intertrakti pri la fino de ĝia atomprogramo.

“Per sia rifuzo de niaj sinceraj dialogoproponoj, la instancoj de Sud-Koreujo,

interkonsente kun eksterlandaj fortoj, laŭgrade ampleksigis siajn politikajn kaj militajn provokojn”, indikis la DPRK Today en artikolo. La gazeto admonis Seulon kaj Vaŝingtonon nuligi siajn komunajn manovrojn Ulchi Freedom Guardian, kiuj komenciĝos la 22-an de aŭgusto kaj daŭros du semajnojn.

La rilatoj de Seulo kaj Pjongjango malboniĝis ekde kiam Nord-Koreujo faris sian kvaran atomteston en januaro kaj lanĉis spac-raketon en februaro, kion diversaj registaroj kvalifikis kiel kaŝitan provon de misiloj, kio sekvigis la akriĝon de la sankcioj, kiuj pezas sur la nordo.

Aliflanke, en la retpaĝo Hispan-TV aperis artikolo, laŭ kiu centoj da sudkoreanoj ĉi-lunde razis siajn kapojn kiel protesto kontraŭ la permeso de Sud-Koreujo al dismeto de la kontraŭraketa ŝildo de Usono, THAAD, en tiu azia nacio.

“THAAD [angla mallongigo de Aerdefendo de granda alteco] devos neniam esti instalota, ne nur en Seongju, sed nenie en Sud-Koreujo. [...] Ni, la loĝantoj, kunvenis ĉi tie kaj ni razis niajn kapojn por montri nian rifuzon de tiu instalado”, klarigis iu el la manifestaciantoj.

Laŭ informoj de sudkoreaj komunik-

iloj, 908 loĝantoj de la komunumo de Seongju – proksimume 300 kilometrojn de Seulo –, kie la THAAD instaliĝos, razis sin proteste kontraŭ la plano de la registaro.

La partoprenantoj entuziasme konsentis sloganojn kontraŭ Seulo kaj ĝia plano. La decido instali la THAAD fine de 2017 respondas al la planoj de Seulo alfronti supozatajn minacojn de Nord-Koreujo. Usono havas proksimume 28.000 soldatojn en Sud-Koreujo. Enketo de Gallup Korea montris, ke 32 elcentoj de la sudkoreoj kontraŭas la instalon de la THAAD.

La sudkorea prezidantino [*], Park Geun-hye, asertis, ke “ne ekzistas alternativo al tiu kontraŭraketa sistemo [...]. Ĝi estas memdefenda dispono, kiun ni decidis starigi por protekti la vivojn de nia popolo kontraŭ la senrespondecaj provokoj de Nord-Koreujo”.

Elhispanigita de Vilhelmo Lutermano el la ĵurnalo Granma (16-an de aŭgusto 2016).

[*] Park Geun-hye estis provizore elpostenigita la 9-an de decembro 2016 per parlamenta voĉdono (NdR).



THAAD

Emblemoj sur la uniformo

Unu tekst-mesaĝo kaj du aŭ tri fotografiaĵoj sufiĉas por estigi diplomatan konflikton. Tiel kolerigis la turkan registaron la, fare de la presagentejo *AFP* (1), antaŭhieraŭ (*) publikigitaj fotografiaĵoj. Sur ili aperas kelkaj el la 150 soldatoj senditaj de Usono al Sirio. Ili estas bone provizitaj per armiloj, teknologio, uniformo, kaj surbrake, sur la maniko, ili portas kudritan emblemeton: sur verda fono kvinpinta ruĝa stelo kaj la literoj *YPJ*, *Yekîneyên Parastina Jinê* aŭ Inaj Protekt-Taĉmentoj. La milico kreita de la siriaj kurdinoj; la grupo, kiu, meze de la militaj kruelecoj, mirigis tiom da okcidentaj landoj kaj homoj, jen el la maldekstro, jen ankaŭ multaj el la dekstro, pro la montrita kuraĝo luktante kontraŭ la ĝihadistoj, speciale en Kobano.

Tamen, neniel sekretas, ke tiu grupo kune kun la PPT (2) estas la milico de la kurda partio PUD (3). Kaj baze la PUD estas la branĉo en Sirio de la PLK (4), fondita de Abullah Öcalan. Sciate estas, ke la PLK aperas en la listoj de terorismaj grupoj de Eŭropa Unio kaj Usono, laŭ peto de Turkio, malgraŭ ke la kurdoj ade petas forstrecki ĝin de tie. Ankaro, kompreneble, rabie demandas, kiel eblas ke grupo konsiderata terorisma en sia flanko de la landlimo povas, sur la alia flanko, ŝanĝi sian nomon kaj ricevi helpon de usonaj soldatoj. “Neakcepteblas la uzo de la PPT-emblemo fare de alianca lando. Ni reagis. Oni ne povas ĝin toleri. Tio estas duobla moralo kaj hipokriteco” deklaris hieraŭ Mevlut Çavusoglu, ministro pri eksterlandaj aferoj de Turkio.

Barack Obama anoncis en oktobro, sen konkrete uzi la vortojn “trupo” nek “soldato”, ke li sendos al nord-okcidenta Sirio (t. e. Kurdio) 50 “specialajn operacantojn”, por helpi kaj kunordigi la batalantojn kontraŭ la Islama Ŝtato. En aprilo li sendis pliajn 250 homojn. Inter la du datoj naskiĝis la SDF (5): fundamente ili estas batal-

antoj de la PPT-IPT, sed aliancitaj kun membroj de arabaj triboj kaj aliaj etnaj minoritatoj kiel asirianoj kaj turkmenoj. La ĵurnalistoj, kiuj ĵus estis kun ili, raportas, ke la kurdoj havas la ĉefan gvidadon de la lukto, sed ke surloke ili havas gravajn aliancojn, interalie por ke la surloka milicoj prenu respondecon super la vilaĝoj, kiam oni forprenas ilin de la ĝihadistoj.

Post ĉiu ĉi laboro, dum senĉese oni anoncis la “liberigon” de Mosulo (6), la SDF-fortoj sciigis, ke ili celas Rakahon (7), ĉefurbo de la IŜ. Evidentas, ke la mano de Usono estas postkulise de la operaco, kaj ĝuste tiel oni publikigis la supre menciitajn fotojn. Al la rabio de la turkoj oni respondis per anglosaksa lingva flegmo: Peter Cook, proparolanto de la Pentagono, deklaris: “la membroj de la specialaj fortoj, agante en kelkaj lokoj, faras ĉion eblan por miksiĝi kun la loĝantaro, por sia protekto kaj sekureco”. Tiuj ĉi vortoj ne faris pli ol furiozigi Ankaron ankoraŭ pli: “Se tiel estas, ni konsilas al ili uzi la emblemojn de la Islama Ŝtato, la Fronto de la Venko (8) kaj Alkajdo (9) se ili iras al aliaj regionoj de Sirio, kaj tiun de *Boko Haram* (10), kiam ili iras en Afrikon”, avertis Çavusoglu.

Kiel neniu alia la kurdoj sukcesis teni la ekvilibron en la siria vesponesto. Kvankam surterene ili havas la armean protekton de Usono, ili scias, ke tio ne estas, ĉar Vaŝingtono malfermis la okulojn nek ĉar ekblovis solidarecvento. Simile, apartan helpon ili ricevis de Rusio; okaze de la Ĝeneva Packonferenco, kiam oni vetois la kurdojn, estis la moskvaj delegitoj — kaj ne la usonaj — kiuj proklamis, ke la kurdoj devus havi lokon ĉe la tablo.

Prefere se mi erarus, sed eblas, ke la afero rilate la emblemeton temas pri ago de ununura soldato. Al Vaŝingtono ne interesas ĝeni Turkion pli ol necese, sed ĝi bone scias, kiuj estas la plejfidelaj kaj fortaj aliancanoj, kiujn ĝi povas trovi nun en Sirio. Feliĉe, la kurdoj scias ankaŭ, ĝis kiu grado mezureblas la fideleco de ties nova amiko sur la internacia areo: nul. Danke al la vivo de generacio da



gejunuloj ili rezistis en sia teritorio, kaj la lastaj aliancoj estas konsekvenco nur de tiuj bataloj. Se ŝanĝiĝus la vento, ili scias, ke ili estus perfidataj, kiel tiomfoje historie. Sed post tiom da historiaj eraroj, ĉifoje ili scias, ke ili havas atutojn — kaj ankaŭ kiel meti siajn kartojn.

URTZI URRUTIKOETXEA

(*) *Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 28-an de Majo 2016-a. Tradukis: NXC. Junio 2016-a.*

Notoj (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj):

- (1) Agence France-Presse, en la franca.
- (2) Popolaj Protekt-Taĉmentoj (PPT)/Yekîneyên Parastina Gel (YPG).
- (3) Partio de la Unio Demokrata (PUD)/Partiya Yekîtiya Demokrat (PYD).
- (4) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (5) Siriaj Demokrataj Fortoj (SDF)/Hêzên Sûriya Demokratîk (HSD).
- (6) Mûsil.
- (7) al-Raqqaqah, en la araba.
- (8) Jabhat al-Nusra, en la araba.
- (9) Al-Qá'ida, en la araba. Ĝi signifas “La Bazo”.
- (10) Ĝihadisma grupo en Niĝerio. Ties nomo, en la haŭsa lingvo, signifas “okcidenteca (neislama) edukado estas malpermesita”.



Novajoj el Francio

➤ En la lastaj tagoj (majo 2016) pluvegis sur 23 departementoj de Francio. La urbeto, kie mi loĝas, situas proksimume en la koro de la koncernata regiono. La rivereto, kiu fluas tra la urbeto, ŝvelis kaj dividas ĝin preskaŭ komplete en du partojn, inter kiuj piedirado estas malfacila. Estas regionoj de la mondo, kie tiaj fenomenoj estas konsiderinde pli ampleksaj, sed tiaj pluvego kaj inundo ĉi tie estas esceptaj. Mi tiurilate tute ne estas en danĝero. La ĉielo estas tute kovrita de unu dika nuboj, kiu kaŝas la sunon, kaj plu pluvus.

➤ Emmanuel Macron (makron), ministro pri “ekonomio”, plurfoje esprimis sian klasan malestimon pri la malriĉuloj. Interalie li diris, ke multaj junuloj esprimas sur la reto la ambicion iĝi miliarduloj. “Tiu ambicio estas bona kaj instigas bonan sintenon al laboro”.

➤ Camille Senon, 93-jara virino, unu el la malmultaj postvivintoj de la nazia amasmurdo plenumita de “SS-Divizio Das Reich” en Oradour-sur-Glane (oradur-sur-glan) (eble okazis miloj da similaj amasmurdoj en Sovetio dum la Dua mondmilito), rifuzis dekoracion atribuitan de la registaro. “Mi bezonas neniun dekoracion, ŝi diris, por plu batali por la socia progreso kaj kontraŭ la *Leĝo Laboro*”. Ŝi estas aktivulino de CGT, sindikata organizo, kiu batalas kontraŭ tiu leĝo.

➤ La proksimiĝo de granda sporta okazaĵo “EURO” kaŭzas grandan polican maltrankvilon, ĉar necesos samtempe fronti la koleron de

manifestaciantoj kontraŭ la *Leĝo Laboro* kaj t.n. ĝihadistan kreskantan minacon.

➤ Francio estas nun ĉefa atencocelo de DAĜŜ/IS pro siaj laikaj leĝoj kaj siaj militaj intervenoj kontraŭ islamistaj militaj operacoj en diversaj landoj. “Ĉiarimede sendistinge murdu francojn”. Ankaŭ islamanoj, kiuj vivas en Francio, estas murdindaj kaj ne indulgindaj laŭ tiuj ĉarmaj adorantoj de la morto (kiun ili blasfeme nomas Alaho).

➤ La manifestacioj kaj strikoj daŭras kaj disvolviĝas kontraŭ la *Leĝo Laboro*, ankaŭ nomita *Leĝo El Khomri*, laŭ la nomo de la Ministrino de la Laboro, kiu prezentis ĝin nome de la registaro kaj de Prezidanto Hollande.

➤ Laŭ informrimedoj, kiuj vaste eĥiĝas eksterlanden, provokante severajn juĝojn pri “tiuj francoj, kiuj obstine rifuzas la plej necesajn reformojn”, la nunaj perturboj kaŭzitaj de la rezistado al la *Leĝo Laboro* en Francio havas nenian seriozan motivon, objekte ne devus koncerni sindikatojn de salajruloj kaj nur havas duarangajn celojn de politikista politiko, kiel kutime en Francio. Laŭ tiuj informfontoj, la du ĉefaj ideologiaj motivoj de tiuj perturboj estas la deziro de la sindikataro CGT reakiri perdatan popularecon kaj ĉiarimede senmotive kontraŭi la kandidatiĝon de Hollande en 2017.

➤ Porparolanto de G7 (ne konfuzinda kun samnoma pariza taksikompanio), kiu ĵus kunvenis, reasertis la firman intencon de tiu

eminenta tutmonda riĉegularo, “batali kontraŭ la nunan krizon por ebligi kreskigon de la salajroj”. Tiuj geniuloj, kies geniecon pruvas ilia riĉeco, ignoras la komunsaĝan aserton de kelkaj entreprenestroj, laŭ kiuj “investi kaj dungi ne estas eble, dum mendoj ne estas sufiĉaj” kaj de altnivelaj ekonomikistoj, kiuj sagace rimarkis, ke ekzistas “psikologia ligo” inter aĉetemo kaj aĉetpovo. Tial necesas akceli la redukton de la kosto de la labor(fort)o por ebligi la kreskon de la aĉetpovo, objektiva kondiĉo por ebligi dezirindan kreskon de la salajroj. Alivorte, necesas redukti la salajrojn por povi kreskigi ilin.

➤ Pierre Gattaz, porparolanto de CaC40 (kakkvardek, la 40 ĉefaj francaj kapitalistaj kompanioj) nomis la strikantojn stratbubaĉoj, ostaĝprenantoj kaj teroristoj.

➤ Manuel Valls, ĉefministro de Francio, restas firma en sia decido trudi la akcepton de la *Leĝo* nomita “Laboro” aŭ “El Khomri”, kies objekto estas interalie (artikolo 2) submeti la aplikon de la laborprotektaj leĝoj al la arbitro de la entreprenestroj. Siaflanke, sindikataro CGT, kies ĝeneralan sekretarion Philippe Martínez amasinformiloj nomas “mastro de CGT”, firme postulas kun la strikantoj la rezignon pri tiu tuta



Camille Senon



Pierre Gattaz

sama leĝo. Tamen ambaŭ tiuj respondeculoj deklaris sin pretaj diskuti. Tion amasinformiloj nomas “malfermo”. Mi proponus kompromison: Valls provizore rezignu sian Leĝ-proponon ĝis estiĝo de pli favora cirkonstancaro, kaj tiu minaco restu por teni vekita la sindefendopretecon de la salajruloj. Por malstreĉi la atmosferon, Valls kondamnis la vorton “teroristoj” uzitan de Pierre Gattaz, mastro de la mastra organizo MEDEF kaj porparolanto de CAC40, kontraŭ la strikantoj.

➤ Dum manifestacio kontraŭ la *Leĝo Laboro*, grenado ĵetita de policano frakasis la kranion de manifestaciinto, kiu nun kuŝas en grava stato en hospitalo. Enketo okazas por scii, ĉu vere la grenado frakasis la kranion, aŭ ĉi tiu frakasiĝis pro iu ajn alia koincido. La uzita grenado estas el tipo konceptita por uzo dum tumultoj, kiuj rekte minacas la policon. Tia grenado eksplodante ĵetas dudek disketojn el malmoligita kaŭĉuko. La koncerna manifestacio ne estas juĝita minaca, sed la ĵetinta policano eble sentis sin minacata, aŭ laciĝo faciligis lian nervoziĝon.

➤ Dum la pasinta semajno, pli ol 880 migrantoj estus mortintaj en Mediteraneo. Kiel franca civitano mi sentas min koncernata.

➤ Laŭ iu komento, la strikoj kaj manifestacioj kontraŭ la *Leĝo Laboro*

aŭ *El Khomri* ne havas objektivan motivon (ĉar “tiu reformo estas evidente necesa”), sed estas nur “epizodo” de la “milito” inter du maldekstrularoj: la reformista (moderna) kaj la radikala (malmoderna kaj kontraŭreformisma). Tiu komento estas mistifika. Jam de jardekoj la reformoj politike truditaj en Francio ĝenerale estas sume reakciaj, neniel reformismaj laŭ la priskribo de Hjalmar Branting en la komenco de la 20-a jarcento: “Uzi la industrian efikecon de la kapitalismo kaj korekti ĝiajn socialajn ekscesojn per la forta mano de la socialdemokrata politika povo”. Precipe ekde la 1980-aj jaroj, la modernan francan industrian efikecon markas amasaj detruoj de produktorimedoj kaj maldungoj, sed ĝi estas ĉefe finance spekulacia, kaj la “forta mano” de la socialista franca registaro estas ĉefe sentebla kontraŭ la salajrularo, sed senkondiĉe komplezema al la kapitalo. Tia reformismo estas tiel moderna, ke ĝi resendas Francion al la sociala stato de la 19-a jarcento.

➤ En Parizo la rivero Sejno plu ŝvelas. Ambaŭflanke de ĝi la bordaj vojoj estas fermitaj al ĉia cirkulado. Se la ŝvelo de la rivero atingos certan nivelon, ankaŭ la cirkulado de ŝipoj riskas esti haltigita. La cirkulado de iuj regionaj vagonaroj jam estas haltigita. La fama muzeo Louvre (luvr) estas

fermita por ebligi la evakuon de ekspoziciaĵoj stokataj en ĝia kelaro.

➤ Ne nur Francion frapas pluvego kaj inundo. Ili ankaŭ frapas almenaŭ Belgion, Germanion kaj Aŭstrion. En la sama momento sudaj regionoj de Francio suferas pro severa sekeco. Grandaj surfacoj de vinberejoj kaj fruktarbejoj tial estas endanĝerigataj, precipe ĉar tiu fenomeno sekvas vintron kun escepte longa periodo de escepte severa malvarmo. Demanditaj fakuloj esprimis dubon pri rilato kun ĝenerala klimata varmiĝo, kiun ili cetere ne neas.

➤ Ankaŭ socialaj perturboj ne koncernas nur “tiujn francojn, kiuj obstine rifuzas la plej necesajn reformojn”. Ĝis ĉi tie eĥas similaj perturboj eĉ en Belgio, pro similaj motivoj. Ĉu ankaŭ niaj belgaj amikoj intencas malfavori la kandidatiĝon de Hollande en 2017? Fakte, la decido detruu la laborprotektajn leĝojn en tuta Eŭropunio venas de la brusela Eŭropa Komisiono kaj klare celas redukti ĉie la “koston de la labor(fort)o”, alivorte la salajrojn. Tio ankaŭ substrekas la hipokritecon de la porparolantoj de G7 (la riĉeguloj de la planedo), kiuj pretendas havi la celon “ebligi kreskon de la salajroj”.

PETRO LEVI

SINDIKATISMO TUTMONDA

Turkio: gazetara libereco estas esenca por la demokratio, liberigu la ĵurnalistojn !

Centoj da ĵurnalistoj estis arestitaj, maldungitaj kaj persekutitaj post la provo de puĉo en Turkio – Liberigu ilin. Turkio spertis sangan provon de puĉo la 15-an de julio, kiu mortigis pli ol 250 personojn, kaj celis gravajn demokratiajn instituciojn, kiel la Grandan Nacian Asembleon de Turkio (TBMM).

La Internacia kaj Eŭropa Federacioj de la Ĵurnalistoj (IFJ-EFJ) senkondiĉe kondamnas la puĉon, kaj la uzadon de perforto kontraŭ la civitanoj, la ĵurnalistoj kaj la novaĵentreprenoj.

La fiaskinta puĉo estis sekvata de urĝa stato kaj ekscesaj aranĝoj, kies celo estas puni ĉiujn individuojn suspektitajn pri rilato kun la provo de

puĉo. La turkaj aŭtoritatoj nun mal-liberigas la ĵurnalistojn, fermas radiojn kaj televidajn kanalojn, kaj cenzuras Interreton por silentigi la kritikojn.

90 ĵurnalistoj estas en malliberejo, kaj pli ol 130 amasinformiloj estis malpermesitaj de post mezjulio. 2500 ĵurnalistoj ne plu havas laborpostenon, kaj arestmandatoj estis lanĉitaj kontraŭ dekduoj da laboristoj en amasinformiloj. Kelkaj familioj de ĵurnalistoj, kiuj kaŝiĝis aŭ fuĝis, estis arestitaj por trudi ĵurnalistojn submetiĝi. Laboristoj de amasinformiloj, ĵurnalistoj kaj defendantoj de

gazetara libereco el la tuta mondo, kuniĝis kun la protestoj, postulante liberigon de ĉiuj ĵurnalistoj malliberigitaj en Turkio.

Informo el **LabourStart**

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3212



Sud-Koreio: liberigu la enprizonigitajn sindikatanojn, respektu la laboristajn rajtojn

La ofensivo kontraŭ la laboristaj rajtoj en Sud-Koreio intensiĝas, kun pli ol 20 sindikataj gvidantoj kaj aktivuloj malliberigitaj, inter kiuj 7 el la KCTU. La prezidanto de la KCTU Han Sang-gyun, la kunprezidanto de la KPTU Cho Sung-deok kaj la prezidanto de la KPCWU Lee Jong-hwa estas enkarcerigitaj. La registaro de la prezidento [*] Park Geun-hye enkarcerigas homojn nur ĉar ili defendas la laboristajn rajtojn.

Nun, la striko de la laboristoj de la publika sektoro kontraŭ la malprogresema reformo de la laboro, kaj la salajra sistemo bazita sur rendimento estis deklarita “kontraŭleĝa”. 9 gvidantoj de la Korea Sindikato de Fervojo estas akuzitaj pri la fifama “obstaklo al ekonomia aktiveco”. Kun la celo akiri ĉesigon de la striko, la registaro planas “urĝan arbitracion”, praktiko denunciita de ILO (Internacia Labor-Organizo) kiel kontraŭa al la asocia libereco. Ankaŭ la sendependaj kondukistoj frontas krimajn kaj civilajn akuzojn pro

antaŭvidita striko.

Kvankam la celo de la internacia protestado estas plejofte la registaro mem, la rolo de la koreiaj entreprenoj, kaj ĉefe la multindustriaj kompanioj, kiuj dominas la nacian ekonomion, devas esti diskonigita. Nova raporto de la CSI/IndustriALL pri Samsung detaligas la rimedojn, kiujn kelkaj dungintoj pretas uzadi, kun la celo akiri malfondon de la sindikatoj, kaj regreson de la laboristaj rajtoj en la internaciaj provizoĉenoj, kiuj intervenas en Koreio.

La prezidento [*] Park devos demisii fine de sia mandato en decembro 2017, kaj estas gravega daŭrigi la agadon por rompi la premon, kiun kelkaj societoj praktikas sur la Ŝtato. Nova prezidento devus efektivigi novan politikon por Koreio, en kio fundamentaj rajtoj, ekonomia kaj labora sekurecoj por la modestaj homoj restariĝas. Dum semajnoj kaj monatoj, ĉia premo sur la nuna reĝimo de la prezidento [*] Park malfaciligos



la profitavidan sintenon de la entreprenoj, kaj ties deziron daŭrigi sian influadon sur unu el la plej gravaj ekonomioj de la mondo.

Informo el LabourStart

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3204

[*] Park Geun-hye estis provizore elpostenigita la 9-an de decembro 2016 per parlamenta voĉdono (NdR).

Liberio: reenpostenigu la sindikatanojn, respektu la sindikatan rajton

En februaro 2014, dudek du sindikataj gvidantoj en la lando estis senapelacie maldungitaj, fare de la Ministro pri Sano de Liberio, post nacia striko por plibonigo de la laborkondiĉoj en la sansektoro. Dudek el ili estis reenpostenigitaj, krom Joseph S. Tamba kaj George Poe Williams, respektive prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la PSI [1], aliĝinto de NAHWAL [2]. La striko sekvis serion da provoj por akiri ŝanĝojn, pere de intertraktado kaj dialogo. Sed ĉiuj ĉi klopodoj estis forpuŝitaj de la registaro. La aĉaj laborkondiĉoj havas malfeliĉigajn konsekvencojn: manko de protekta materialo, longaj laborhoroj, kaj manko de medikamentoj kontraŭ la viruso Ebolo, kiu okazigis centojn da mortoj ĉe la sanlaboristoj.

Ĝis nun, fondo, organizado aŭ aniĝo al sindikato, kiu reprezentas ilin, plu estas kontraŭleĝa por la laboristoj de

la publikaj servoj, malgraŭ la ratifo de la konvencioj 87 et 98 de ILO [3], fare de Liberio.

La PSI [1], la ITF [4] kaj la ITUC Afriko [5] petas de siaj aliĝintoj kaj aliancanoj, sendi mesaĝojn al la liberia registaro, por postuli reenpostenigon de la maldungitaj laboristoj, agnoskon de la sindikata rajto por la laboristoj de publikaj servoj, kaj respekton de la sindikataj rajtoj por ĉiuj laboristoj de Liberio!

Informo el LabourStart

https://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=3196



[1].Internacia organizo de Publikaj Servoj.

[2].Nacia Asocio de la Sanlaboristoj de Liberio.

[3].Internacia Labor-organizo.

[4].Internacia Federacio de Transport-laboristoj.

[5].Afrika sekcio de Internacia Konfederacio de Sindikatoj.

Ni ne plu ripetigu nukleajn akcidentojn

Prelego de s-ro Ito Tacuja, kiu loĝas en la urbo Iŭaki, Fukuŝima, kaj laboras kiel estrarano de la “Tutjapana Centro de kontraŭnukleenergiaj movadoj”, fine de la fakkunsido “Energio kaj nukleaj centraloj”, kiu okazis en la gubernio Fukui, kadre de la 62-a Internacia Patrino-Kongreso.

Nun, 5 jarojn post la akcidento en Fukuŝima

1. En 6 urboj damaĝitaj de la akcidento nun neniu loĝas. La loĝantaro de Fukuŝima malpliiĝis je 5,7%. Tio estas la plej granda malpliiĝo en Japanio.

2. Eĉ post 5 jaroj okazadas nerektaj mortoj pro la akcidento (akcident-rilatantaj mortoj pro malbona flegado post la katastrofo, ŝanĝiĝo kaj malriĉiĝo de vivo, malespero, sinmortigo ktp.). La nombro de rektaj mortoj pro la cunamo estas 1604, sed la rilatantaj mortoj estas 2006 (ĝis decembro 2015).

3. Ĝis perfekta forĵeto de tiuj difektitaj reaktoroj oni bezonas pli ol 40 jaroj. Oni ankoraŭ ne scias, kie kaj en kia stato estas fandiĝintaj nukleaj brulaĵoj. Se oni kovros la reaktorojn per “ŝtona ĉerko” same kiel en Ĉernobil, oni devos prizorgi ilin dum la venontaj kelkcent jaroj.

4. La registaro planas (parte komencis) konstruigi “provizoran konservejon de poluitaĵoj,” kiu etendiĝos en ambaŭ urboj Ookuma kaj Futaba, kaj ĝi promesas, ke 30 jarojn poste ĝi transportos tiujn poluitaĵojn ekster la gubernion Fukuŝima, sed neniu kredas tiun promeson. Certe tiu fariĝos eterna konservejo.

5. En iuj urboj poluitaj de nukleaĵoj kaj poste “purigitaj”, nun la loĝantoj povas reveni, sed ili ne povas facile reveni pro manko de hospitaloj, vendejoj kaj aliaj necesaj funkcioj kaj pro timo al radioaktiveco.

6. La registaro ne havas planon senpoluigi la dense poluitajn urbojn.

7. Oni trovis 161 infanojn, kiuj suferas pro tiroida kancero, kaj 42, pri kiuj estas suspekto pri tio. Inter esploristoj kaj kuracistoj estas du opinioj. Iuj atribuas tion al la nuklea akcidento, sed aliaj ne. Nekonsiderante la kaŭzojn, oni devas varme kaj longe prizorgi tiujn infanojn.

8. Malharmonio okazas inter la suferantoj de la akcidento. La registaro dividis ilin laŭ la distanco inter iliaj domoj kaj la nuklea centralo, laŭ la kvanto de radioaktiveco

en iliaj loĝlokoj, kaj per la kvanto de kompensa mono surbaze de la supraj kriterioj. Ni devas venki tiun malharmonion kaj regajni solidarecon inter la suferantoj.

Movadoj kontraŭ nukleaj centraloj

1. Antaŭ la 11a de marto 2011

1. Ni batalis en la juĝejoj kontraŭ la konstruo de la nukleaj centraloj, sed malvenkis.
2. La “Tutjapana Centro” avertis la registaron kaj TEPCO-n kelkajn fojojn pri danĝero de eblaj grandaj cunamoj, sed ili tute ne aŭskultis nian averton.

2. Novaj vidpunktoj post la katastrofo

1. La movado kontraŭ la nukleaj centraloj fariĝis granda tutjapana movado, en kiu ĉiuj povas partopreni.
2. La grupoj, kiuj subtenas la nukleenergian politikon, subtenas ankaŭ nuklearmilan politikon kaj provas ŝanĝi la 9an artikolon en la Japana Konstitucio, kiu malpermesas militon kaj posedon de armeo. Tial ni devas havi fortan solidarecon kaj kuniĝintan agadon inter niaj tri movadoj, kiuj celas protekti vivon de la popolanoj, nome movado kontraŭ nukleaj centraloj, movado por aboli nukleajn armilojn kaj movado por protekti la Japanan Konstitucion.

Kio estas grava por ne ripetigi nukleajn akcidentojn

1. Ni dividu faktojn, spertojn kaj lecionojn de la nuklea akcidento inter ni.

2. Ni havu komunan komprenon pri jenaj danĝeroj de japanaj nukleaj centraloj:

1. Danĝero pro manko de sufiĉa teknologio, precipe danĝero de bolakvaj reaktoroj kaj danĝero pro kadukaj reaktoroj.
2. Danĝero pro la speciala kassistemo de la elektraj kompanioj. Dank’ al tiu avantaĝa sistemo ili povas libere kolekti monon el la poŝo de la popolanoj, kiam ili “bezonas” ĝin kaj povas konstruigi nukleajn centralojn laŭ sia volo kaj sen financa problemo.



Granda preleg-salono estas plena de virinoj el la tuta Japanio



Ito Tacuja

3. Danĝero pro la geologia strukturo de la japana insularo, kie ofte okazas tertremoj kaj vulkanaj erupcioj.
4. Danĝero pro geografia vidpunkto. Nukleaj centraloj situas proksime de urboj kaj vilaĝoj. En malgranda tereno de nukleaj centraloj staras pluraj reaktoroj.
5. Danĝero pro manko de internacnivela regularo por kontroli la nukleajn centralojn. Troviĝas nur por-registara kaj por-elektrakompania komitato nomata "Nuklea Reguligada Aŭtoritato".
6. Danĝero pro profitcela sinteno de la elektraj kompanioj. Ekzemple, kiam okazis la grandaj tertremoj en Kumamoto en aprilo 2016, la elektra kompanio Kjuuŝuu neniam intencis haltigi la reaktorojn.

3. Ni havu komunan ideon por konstrui urbojn ne dependantajn de nuklea energio.

4. Ni havu komunan ideon pri renoviĝanta energio. Ĉie en Japanio troviĝas naturaj, renoviĝantaj energifontoj, kiujn ni povas utiligi laŭ la bezono de la regiono kaj per malgranda kapitalo kaj el kiuj ni povos profiti.

Estonteco de Fukuŝima

1. Ĉiuj urboj en Fukuŝima postulas forĵeton de ĉiuj 10 reaktoroj en Fukuŝima, tamen TEPCO kaj la registaro silentas.

2. Fukuŝima celas, ke ĝi estu gubernio de renoviĝanta energio. Tio estos la plej granda kontraŭbato al la registaro kaj TEPCO, kaj samtempe per tio ni dankas al ĉiuj, kiuj helpas Fukuŝima-n.

Tradukis HORI Jasuo
Aŭgusto 2016

Kio estas la situacio de Fukuŝima ?

La unua Internacia Patrino-Kongreso okazis en Lausanne, Svislando, en julio 1955. Ĝin partoprenis 1060 homoj el 68 landoj. En la antaŭa jaro Usono eksperimentis hidrogenbombojn en la suda Pacifiko. Pro la eksperimentoj mil japanaj fiŝkaptistaj ŝipoj suferis kaj radioaktiva pluvo falis sur Japanion kaj certe sur la tutan terglobon. Pro la timo patrinoj en la tuta mondo organizis tiun kongreson, sed bedaŭrinde neniam plu okazis la internacia patrino kongreso en la mondo krom en Japanio. Nur japanaj patrinoj seninterrompe organizadas la

kongreson ĉiun jaron, kaj en tiu ĉi jaro ĝi atingis la 62an kongreson. Pro tiu historio patrinoj partoprenantaj en la kongresoj havas grandan intereson pri nukleaj aferoj, do ankaŭ en tiu ĉi kongreso, kiel senigi nukleajn centralojn el Japanio estis unu el la plej gravaj temoj.

La fakkunsido "Energio kaj nukleaj centraloj" okazis en la gubernio Fukui, kie troviĝas 15 reaktoroj. En la kunsido patrinoj, kiuj agadas kontraŭ la nukleaj centraloj en sia gubernio, konkure surpodiĝis kaj raportis pri sia, foje sukcesa, foje malfacila, agado.

Ankaŭ mi volis raporti pri mia raportado per Esperanto, sed bedaŭrinde mi ne estis akceptita. Eble oni ne bone sciis, kio estas Esperanto kaj krome mia propono estis tro internacia por la organizantoj.

Dum tiu kunsido mi miris pro energio kaj entuziasmo de la patrinoj. La slogano de la kongreso estas "Patrinoj, kiuj naskas vivon, protektas kaj flegas ĝin". Vere patrinoj estas fortaj.

HORI JASUO
27-an de aŭgusto 2016



Patrinoj de la gubernio Aomori raportas pri sia batalo kontraŭ la konstruata nuklea centralo Ooma.

Kamparaj movadoj organiziĝas kontraŭ la agrikultura industrio kaj la Genetike Modifitaj Organismoj

Ĉie en la mondo, kamparaj movadoj organiziĝas kontraŭ la agrikultura industrio kaj la GMOj (Genetike Modifitaj Organismoj) en la celo protekti la biodiversecon kaj la estontecon de la planedo. Simbolo de tiu lukto estas la kamparaj semoj, ne-GMOaj semoj, sen proprieta rajto. Ili estas interŝanĝitaj kaj riĉigitaj de antaŭ jarmiloj, aŭtentikaj protektantoj de la biodiverseco por la tuta homaro.

La batalo de tiuj kamparaj movadoj estas eĉ pli aktuala de post la anonco, la 14an de septembro 2016, de la aĉeto de la usona giganto pri agrikulturaj bioteknologioj, Monsanto, fare de la germana kemia kaj farmacia grupo Bayer.

La naskiĝo de tiu giganto maltrankviligas la ekologiistojn, NROjn kaj ankaŭ la famajn francajn kuiristojn kiel Cyril Lignac, Yannick Alléno, Yves Camdeborde, Christophe Michalak kaj Thierry Marx, kiuj alvokas al bojkoto de Bayer-Monsanto. Ili timas la kontrolon de la tuta agrikultura ĉeno, kiu iras de la selektado de semoj, ĝis la telero de la konsumantoj. Ili lanĉis alvokon al kolektiva ekkonsciigo en *Malferma letero kontraŭ invado de agrokemio en niaj teleroj*.

Monsanto plene regas en la merkato de la mondaj semoj

Ĝi ankaŭ estas la unua liveranto de GMOj (Genetike Modifitaj Organismoj), kies patentojn ĝi plejparte posedas. La grupo estis implikita en multaj skandaloj, interalie koncerne ĝian Roundup, kiu entenas glifozaton, herbicido plej vendata en la mondo. La grupo Bayer, naskiĝinta el la kunligo de kemiaj industrioj IG Farben – produktisto de la gaso Zyklon B uzita en la ekstermaj koncentrejoj – kiu estis malfondita fine de la Dua Mondmilito.

Bayer estas ege potenca en la sektoro de pesticidoj en Eŭropo kaj Azio.

Kontraŭ tia monopolo, la kamparanoj renkontitaj en Francio, Senegalo, Etiopio kaj Indonezio luktas ĉiutage. Tiuj terkultivistoj liberiĝis de la industriaj agrikulturaj industrioj kaj disvolvas sistemojn de interŝanĝoj de la prajaj lokaj semoj, adaptitaj al la tero kaj naturmedio.

Informo el Neniām milito inter ni
<http://neniammilitointerni.Overblog.com/2016/10/tutmondo-kamparaj-movadoj-organizigas-kontrau-la-agrikultura-industrio-kaj-la-genetike-modifitaj-organismoj.html>



Kamparanoj el Malio

EL LA SAT-ADMINISTREJO

Novaj aliĝoj

36072*	KRAUSSE Rebecca	US NY-14304 - NIAGARA FALLS	Usono
36073	PÉREZ Gilles	FR 34090 - MONTPELLIER	Francio
36074*	SAGANE Mayumi	JP 625-0085 - KYOTO-shi	Japanio
36075*	GABORIT Pauline	FR 49700 - TUFFALUN	Francio
36076	YOKOYAMA Hiroyuki	JP 004-0880 - SAPPORO-shi	Japanio
36077	JABLONSKI Roland	PL 15-235 - BIAŁYSTOK	Pollando
36078	SERPOLLET Philippe	FR 73000 - CHAMBÉRY	Francio
36079	PASSOS DO NASCIMENTO Josenilton	BR CEP 40415-006 - SALVADOR-BAHIA	Brazilo

Malserena translokiĝo

Tiun matenon mi estis kunvokita ĉe la direktoro. Kvankam direktoro de la entrepreno, ĉi tiu ne havis la agmanierojn, kiujn oni devas trovi ĉe iu persono de tiu nivelo. Tio certe estis pro la fakto, ke li komencis sian profesion vivon ĉe la malsupro de la ŝtupetaro kaj kreskis ĝis la unua rango. Do, li probable havis nur ĝeneralan instruon. Tio povis sufiĉi en normala funkciado, sed manko de scio fine estis kvazaŭ netrairebla muro, kiam la entrepreno renkontis gravajn problemojn.

Laŭ sia konata agmaniero li sen enkonduko tuj sciigis min:

— Mi ordonis, ke oni portu cent kartonskatolojn al vi. Por vendredo vi pretigos la dokumentojn, dosierujojn, komputilojn kaj la tutan ceteron de la aferoj, kiujn vi havas je dispono por la mastrumado de via sekcio kaj vi enpakos la tuton. Ŝarĝveturilo venos preni ĉiujn tiujn pakojn kaj ilin translokos al Valkorto [FR-52100 Valcourt (NdR)], kie ni luprenis sufiĉe grandajn lokojn. Vi daŭre organizos kaj estros la laboron, kiun mi konfidis al vi. Atentu bone, kion mi volas, ke vi faru! Vi iras al Valkorto, ĉar mi ne povas alimaniere fari, tamen vi restos sub mia respondeco. Tuj je via alveno, vi certigos, ke ĉiuj pordoj de via oficejo estas ekipitaj per bonaj seruroj, se ne, vi zorgos ilin ŝanĝi. Absolute neniu, kaj eĉ ne la direktoro de la uzino aŭ iu ajn de iliaj reprezentantoj devos eniri por havi informojn aŭ vidi, kio estas farata. Ĉiuj niaj agoj devas absolute resti sekretaj por la uzino. Neniam tion forgesu! Se problemo okazos, vi rekte devos vin turni al mi aŭ, se ne al sinjoro Arturo, nia ĉefkontisto, kiu ankaŭ havas sian oficejon surloke.

Pri tio, kio koncernas viajn du helpantinojn, vi faros, kion vi volas kaj kion vi povos. Aŭ vi organizos, por ke ambaŭ konsentu esti translokitaj kun la oficejo, aŭ vi devos trovi novajn sekretariinojn en Valkorto. Eventuale sinjoro Arturo helpos vin por trovi solvon...

Revenante al la oficejo mi tuj vidis sur la vizaĝoj de miaj helpantinoj (unu estis sekretariino kaj la dua helpa librotenistino), ke jam ili estis informitaj. En la entrepreno, ĝenerale ju pli informo estis sekreta, des pli ĝi estis rapide konata de ĉiuj. Neeblis iomete prokrasti, do mi rekte demandis:

— Ĉu vi konsentos esti translokitaj al Valkorto? Se vi jesas, estos por vi kiel por mi tre pozitiva afero. Mi ne bezonos dungi novajn sekretariinojn kaj ne perdos horojn por ilin formi al la fareda laboro. Por vi estos eksterordinara okazaĵo! Vi komencos novan vivon! Ĉi tie laborante en Parizo, vi perdas longajn horojn en la trajnoj kaj metrooj, matene kaj vespere kaj tio multe kostas al vi! En Valkorto la entrepreno havas tutan vilaĝon kun ĉio bezonata aŭ dezirata kiel: stacidomo, poŝtoŝtationo, sportklubo, kinejo, magazenoj, kuracisto, socialaj servoj ktp. Nur kelkajn minutojn vi malŝparos por piediri de via loĝejo al via laboro. Imagu, kiom da kroma tempo vi havos por profiti de via propra vivo, vin delekti de la kamparo kaj de la mirindaj arbaroj ĉirkaŭantaj. Tiom en Parizo la vivo multekostas, opresas, temporabas, tiom en Valkorto ĝi kvietegas... Morgaŭ matene, vi sciigos min pri via decido. Malfeliĉe ni ne havas pli da tempo, ĉar la Societo devas rapide organizi la translokiĝon...

La tago pasis kiel fulmo. Ni ne trovis tempon por diskutadi pri la eventoj. Finfine tiel, tio estis preferinda!

Sekvamatemne mi estis en la oficejo jam de du longaj horoj, okupata al la lastaj preparadoj, kiam eniris la unua kaj diris:

— ... Mi ne venos! Ĉi tie en Parizo, ni havas la plej bonan de ĉio, kion ni povas deziri kiel kinejojn, teatrojn, manifestadojn ktp. La publikaj kaj privataj servoj estas je iu ne komparebla nivelo. Valkorto estas urbeto meze de la kamparo kun la solaj servoj kreitaj de la entrepreno kaj kie mi trovas nenion de tio, kio povus min interesi... Se en ĝi eblas ŝpari monon kaj tempon, kion mi faros kun ili? Mi ne scios kiel ilin eluzi...

La dua sin montris pli hezitema:

— Mia edzo prizorgas la verdajn spacojn por la komunumo de Sankta-Denizo [Sankta-Denizo (NdR)]. La salajro ne estas granda, sed tamen signifa. Li ne volas ĝin perdi malgraŭ tio, ke via propono estas interesa...

Dum tagmanĝo, mi konversaciis kun sinjoro Arturo kaj poste, reveninte en la oficejon, mi povis fari pli interesan proponon. Tuj mi ekparolis pri nia afero:

— Ĉu, dum la manĝo, vi ŝanĝis vian opinion?

Ili hezitis, sed nenion diris. Tamen ŝajnis al mi, ke dum la paŭzo ili arde

diskutadis pri la ŝanĝoj okazantaj. Mi rompis la silenton:

— Mi havas ŝercon! Mi kredas ĝin sufiĉe forta por vin helpi preni la bonan decidon, kiu tute alimaniere ordigos vian estontecon. Por ambaŭ el vi, mi proponas loĝejon senpage kaj por la edzo dungita en urbodomo, mi proponas laboron en nia centra deponejo kun la sama salajro. Ĉu bone? Nun, repensu al mia propono... Pripensu kaj rapide donu vian finan decidon. Sed ne forgesu, ke poste vi ne plu povos ion ŝanĝi.

Ĝis la fino pretigante la pakojn, ili bone helpis min, sed rifuzis veni kun mi. Ili restis en Parizo...

La sekvantan lundon, anstataŭ ellitiĝi je la kvina matene por trajniri al Parizo, mi nur leviĝis je la oka. Mia veturado al Valkorto daŭris malpli ol dudek minutojn kaj mi alvenis antaŭ la pordo de mia nova laborejo. Por mi kaj mia familio estis tre bona novaĵo kaj la promeso de ia pli normala vivo.

Granda estis mia surprizo, kiam surloke mi ekvidis elpakantan virinon, kies vizaĝo mi konis. Ŝi estis Dalila! Pasintece, ŝi laboris kiel sekretariino en la lernejo de la entrepreno. Foje oni petis mian intervenon por gvidi fakan kurson, tiamaniere mi konatiĝis kun ŝi. Por mi, ŝi estis efika, agrabla kaj lerta virino, eĉ se ŝia tiama ĉefo metis dubon.

En la oficejo io nekutima kaptis mian atenton. Supre de ĉiu telefono estis seruro. Mi rapide komprenis, ke nur la ĉefoj havis ŝlosilon je dispono. Danke al ĝi, ili povis libere telefoni, kie ili deziris. Ne havante ŝlosilon la aliaj dungitoj uzis telefonon ekskluzive interne de la uzino. Dum Dalila tion klarigis al mi kun ia ĝenata mieno, mi malŝlosis la telefonojn, malfermis fenestron kaj forte ĵetis la ŝlosilojn al la ĉielo. Ili estis forglutitaj de la veprejoj. Tiam en mia dorso aŭdiĝis:

— Vaaaauuuu! Sinjoro! Neniu rajtas tion fari!

— Dalila, vi ne plu bezonos permeson por telefoni!

— Nur ĉe la direktoro la telefonoj ne estas ekipitaj per ŝlosiloj. Mi pensas, ke la respondeculo pri materialoj estos malkontenta kaj postulos klarigojn. Mi timas, ke ni devos pagi...

— Invitu tiun respondeculon pri la materialoj veni plej rapide, mi havas laboron por li.

Tiel mi havis mian unuan kontakton

kun dungito de la uzino, kies intervenon mi ofte petis poste. Li estis servema viro kaj tiam diris:

— Mi scias, ke vi estas la ĉefo de tiu nova oficejo. Pri via alveno kuras multaj klaĉoj en la uzino. Ĉi tie la homoj iomete enuas kaj pro tio estas ege scivolemaj kiam io okazas... Se vi bezonas specialan instaladon, diru kaj mi ĝin faros. Estas mia fako! Vi simple plenumos mendon, ĉiam aprobitan de la sekciestro... de vi ĉi tie. Se la materialoj ne estas disponeblaj en la stoko, mi mendos ilin kaj tiel mi povos rapide veni fari la instaladon. En la urĝo, bonvolu rekte telefoni al mia numero...

— Tiuokaze, mi petas, bonvolu anstataŭi tiujn malnovajn aparatojn, kiuj malbone funkcias. Por ia bona irado de nia oficejo, ni ĉiam devas esti en kontakto kun eksteraj societoj. Telefono estas nia unua laborilo. Evidente vi faros fakturon je kosto de mia servo...

Kun ia rapida palpebrumo, li aldonas:

— Telefonoj sen ŝlosilo, mi supozas!
— Absolute! Ni ne havas tempon malŝpareblan.

Antaŭ la fino de la semajno, ĉiuj telefonoj de la oficejo estis anstataŭitaj kaj en la uzino la klaĉoj intensiĝis.

La unuajn tagojn, la ricevataj leteroj dormis, tamen ne forgesite. Dume ni arde laboradis por ĉion elpaki kaj organizi la oficejon.

La plej grava problemo estis trovi libroteniston. Mi kredis ĉion scii pri la funkciado de la Societo, sed mi eraris.

Mi vizitis la ĉefkontiston, sinjoron Arturo, por peti libroteniston, almenaŭ je la nivelo de "helpkontisto". Tio ŝajnis al mi esti minimuma peto facile havebla. Kun rideto li aŭskultis min kaj mallaŭtvoĉe diris kun granda bedaŭro:

— Ekde iom da tempo estas kvazaŭ eta milito inter la du grandaj departementoj de la Societo "uzino kaj detalo". Pro tio, kiam iu povas malhelpi la alian, ĝi volonte tion faras...

En Parizo la disponeblaj oficejoj maloftas kaj multekostas, kiam en la uzino multaj estas subuzataj. Tiel ni okupas lokojn luprenitajn al la uzino kaj tie ni formas anekson de la vendo-departemento.

Laŭ decido de la ĝenerala estraro, kiam ni bezonas ion, ni estas devigataj ĝin mendu al la faka servo de la uzino. Estas same por havi oficiston. Ni devas fari peton al la direktoro de la oficejo pri personaro de la uzino. Responde, ili sendas iun ajn homon, preferinde

tiun, kiu estas senutila ĉe ili... Kiam "la elektito" scias legi kaj skribi, jam ni povas esti feliĉaj. En tiaj cirkonstancoj, estas malfacile bone labori...

— Mi timas ke, se vi volas asistanton, vi devos mem lin formi...

Nekredeble! Kiel entrepreno povus bone funkcii tiel?

Dum homoj kuraĝe laboras en malfacilaj kondiĉoj, por ke ĉio bone sin disvolvu, kvazaŭ temas pri ludo, du internaj direktoroj interbatalas kiel knabaĉoj. Se tiamaniere ili kaŭzas gravajn damaĝojn, kiuj malhelpas la funkciadon de la entrepreno kaj povos konduki ĝin al ĝia perdo, ŝajne ilin ne ĝenas.

Mezaĝa virino sendita de la oficejo pri personaro sin prezentis:

— Mi jam manlaboris en ateliero de la uzino. Pro kaŭzo de malsano mi restis hejme dum multaj monatoj. Laŭ la asekura kuracisto mi denove estas labortaŭga, sed mi ne povas transporti pezajn ŝarĝojn, kiel mi faris antaŭe... Ankaŭ mi ne povas akcepti malfacilan laboron... Pro tio, oni sendis min al vi, ĉar ĉi tie, ĉio estas pli facila...

Mi restis sen spiro kaj ne trovis ion ajn direblan!

Longajn horojn mi malŝparis instruante al ŝi parskriban kontregistradon. Vane! Ĉiun vesperon mi devis kontroli ŝian laboron kaj pacience ĝin refari. Dume mia propra laboro atendis! Kompense mi laboregis, ĝis noktomeze. Tio ne povis daŭri! Neniu povas longe

tion fari.

Tiu virino estis agrabla, sed ne havis la necesan scipovon por tiu tasko. Ŝi ne ĉeestis sufiĉe da tempo, por ke mi ŝian nomon bone skribu en mian memoron. Post ŝi sinsekvis du pliaj personoj, kiuj ne nur ne estis pli kompetentaj ol ŝi, sed krome ne estis interesataj de la farena tasko.

Jen alvenis Albano, filo de la privata sekretariino de la direktoro de la oficejo pri personaro. Informite mi kredis, ke eble, tiam la aferoj fine normaligiĝos. Mi pravis! Jam tiam lia patrino kaj ŝia sekciestro diskrete venis informiĝi pri li.


— Ĉu vi estas kontenta pri tio, kion li faras? Ĉu li bone laboras?

Klaĉoj pri Albano rivelis al mi, ke en la pasinteco li estis multfoje translokita de oficejo al alia. Ĉiufoje tio estis fiasko! Mi havis kun li konversacion:

— Albano! Mi prifajfas la klaĉojn, kiuj rondiradas en la entrepreno. Ŝajnas, ke ĉi tie, tio estas la preferata sporto, sed ĝi tute ne interesas min. Ĉu mi povas serioze kalkuli kun vi? Jes aŭ ne? Mi bezonas havi respondon senprokraste...

— Tiu laboro plaĉas al mi kaj mi tre deziras havi la eblecon resti ĉi tie. Mi nur bezonos disponi kelkajn posttagmezojn pro tio, ke mi ludas futbalon en la skipo de la uzino. Mi devas partopreni al trejnadaj.

— Futbalo! Tio estas definitive eksterema! Ĉi tie vi ne laboras en la uzino, kie neniu povus rimarki vian



malĉeeston, sed en la vendo-departemento. Mi absolute bezonas vian partoprenon, ĉar mi sinkas en faskoj da paperoj registrotaj. Ĉu mi povos kalkuli je vi sen iu ajn manko? Vi devas tuj decidi pri tio!

Albano decidis resti konformiĝante al miaj postulataj kondiĉoj...

Neniam li kaŭzis al mi problemon. Mi eĉ povas diri, ke li serioze laboris, ĝis kiam iutage la estrarano sen averto decidis, ke li, Albano, ano de la fabrikado, ne plu laboros en mia oficejo

pro tio, ke ĝi estis anekso de la komerca branĉo. La vera kaŭzo estis de mi nekonata krom la fakto, ke temis pri ia nova grado de la batalo furoranta ene de la societo inter la uzino kaj la vendo-departemento. Antaŭ tiom da azenaĵoj, mi estis malkontenta kaj pri tio mi ĉiujn informis des pli facile, ke mi ĵus estis elektita reprezentanto de la Ĝenerala Konfederacio de la Kadroj. Tio protektis min, kiam la estraro malŝatis miajn manierojn vidi la eventojn.

Mi ne scias, kiu aŭdis miajn akrajn

protestojn, sed mi ricevis pozitivan respondon. Alvenis Brigita, juna, lerta kaj kompetenta virino. Por respondi al mia peto ŝi estis laŭregule translokata de la uzino al la vendo-departemento, dum ŝia edzo daŭre restis ano de la uzino. Foje okazis tute nekompreneblaj eventoj...

Rapide ŝi okupiĝis pri la librotenado kaj mi ne plu bezonis bati al mi la kapon pro tio. Kun ŝia alveno, nova ĉapitro malfermiĝis por mia oficejo.

ROGER CONDON

La varma karno de l' vortoj (2)



Raymond Queneau aliĝis al la surrealista movado nur ses jarojn, kaj lia verkaro ne estas aparte surrealisma, precipe la ĉi-tema soneto.

Kvankam, li ŝajnas esti libera (elasta, dirus Ĝemil) kun la vortoj, li uzas ilin tre precize kaj akademie (ĝuste pro tio, lia poezio trafas). En ĉi soneto, li nur kreas tiun "alphadécédet" miksaĵo de "Alphabet" (Alfabeto,

sed fakte "abécédaire" (aboco-libro, ankaŭ libro analoge al vortaro) ĉar "abécédécédet" estus malpli facile tuj komprenebla) kaj "décédé" (morta).

Queneau uzas rigoran formon de soneto kun tre regulaj aleksandroj kaj regulaj rimoj. Ja Ĝemil rajtas uzi pli liberan (barbaran) formon sed tio iom ŝanĝas la atmosferon de la soneto.

Ĉar pasintfoje mi aludis al la malfacileco "traduki" vortludojn, ĉi tie mi ja frontis la "alphadécédet" de Queneau. Mi agis laŭ la sama maniero mikskante la vortojn "Glosaro" kaj "Glosektomio", kio estas "Tuta aŭ parta

fortranĉo de la lango" (kongrua kun la temo, ĉu ne?) en iu "glosektomio". La versoj estas regulaj esperantaj aleksandroj, kun rimoj nur preskaŭ rigore sonetaj, kiuj foje estas nur asonancoj. Mi fine trovis rimedon por ke ĝi estu "regula" (akademia) soneto kiu preskaŭ uzas la saman rim-sistemon de Queneau, nome ABAB ABAB CDD CEE, dum Queneau uzas por la ses lastaj versoj DDC EEC.

La varma karno de l' vortoj

Ĉi vortojn enmanigu, el ties piedoj lertaj
Vi sentu, kaj el koroj, batantaj hunds simile,
Karesu ties felon, ke ili restu mutaj
Sur viajn krurojn venu, kaj kuŝu plej trankvile.

Niĉforma uj' de sonoj iĝinte plej inertaj
funkcias kontraŭ ratoj akademi-ŝirmile.
Eĉ se taksate krudaj, 'stas vortoj plej malfortaj,
Kaj ties morto oftas sufoke kaj senspire.

Nu, tiam oni lokas en ejoj nekropolaj
Nomataj far mokemaj ŝerculoj, jen « vortaroj »,
kaj foje fridpisulaj, jen « glosektomioj ».

Sed kial ĉiam plori pri faktoj plej frivolaj
Se simpla, elokventa, konata, elementa,
Manprenu tuj la vorton, ja l' karno nur 'stas enda.

RAYMOND QUENEAU

Bildo, teksto kaj traduko: Serĝo Sir'

Pri poezio

Poezio kiel humuro multe baziĝas sur aludoj, elvokoj kaj dusencoj aŭ plursencoj, kiuj nur esceptokaze estas internacie kompreneblaj. Al tio aldoniĝas, por la poezio en versoj, la formalaj postuloj de versfarado: ritmo, sona harmonio, rimoj... Tial poezio ankoraŭ pli ol humuro estas malfacile tradukebla de unu lingvo al alia. Tial kontraŭe al facilanima legendo, bona traduko de poeziaĵo en Esperanton estas riskoplena tasko, kiun malmultaj provantoj, eĉ inter la plej entuziasmaj,

vere sukcesas efektiviĝi. Fakte eĉ prozo estas malfacile tradukebla, inkluzive en Esperanton, interalie kaj eble precipe tial, ke ofte multaj detaloj de la plej bone verkita originalo ne estas unusencaj aŭ estas kulturaj aludoj, kiuj ne estas internacie kompreneblaj. Bona tradukisto laŭeble laŭvorte sekvas la originalon; tamen li ne tradukas vortojn sed ideojn. Vortkripligoj kaj literaturaj supozitaj elvokivaĵoj anstataŭ kutimaj samsencaj vortoj ne apartenas al bona stilo.

Tial oni neniam ĉesos traduki ĉefverkojn de la estinteco, la universala kulturo ne povas esti unulingva kaj la Bulonja Deklaracio prave distingas la celon "elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn", kiun ĝi rifuzas, disde la esperantisma celo, doni "al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si".

PETRO LEVI

Ni ekstermu la konspirteoriojn !

Jen kelkaj pripensoj, sokratece ironiaj, inspiritaj de la legado de la romano de Anna Löwenstein *Morto de artisto*, kiu pritraktas la Nerono-tempo plenplenan de konspiroj.

Ha! Nerono! En la tradicia historio tia, kia la historiistoj pridiris nin en la daŭro de 2000 jaroj, ĉirkaŭ li estis multe da konspiroj. Kaj unue tiu de lia patrino Agripino, cele meti sian filon sur la “trono” (nu, tio ne estis oficiale trono, ĉar ne estis oficiale monarĥio, kaj Romo estis plu oficiale “respubliko”) kun interalie la venenigo al ŝia edzo Klaŭdio. Postatempe, estis la konspiro de Nerono kontraŭ lia patrino, tro invadema laŭ li, kondukanta, post pluraj fiaskintaj provoj, al ŝia mortigo. Poste ampleksa konspiro celis faligi Neronon kaj doni la imperion al Kalpurnio Pisono. Ĝi fiaskis, kaj multe da homoj estis ekzekutitaj. Fine, du jarojn poste alia konspiro potencigis la maljunan Galbon, kaj Nerono fuĝis, sin kaŝis en forlasita farmdomo kaj fine gorĝo-tranĉis sin mem.

Sed ĉio tio, memkompreneble, estas entute malvera!

Tio estas evidenta! Tial ke la nuntempa dogmo asertas al ni ke *konspiroj, tio nepre ne ekzistas!* Ke nur paranojaj frenezuloj, fiaj rasistoj, komunist-islam-teroristoj, kontraŭjuduloj, pedofiloj, fumantoj, manasklapano-en-la-kapo-uloj, samseksemuloj (aŭ pli bone samseksemul-malamantoj, la sociaj normoj ŝanĝiĝis!) kapablas – fakto ege stranga kaj nekomprenebla, pri kiu arde pripensas ĉiuj gazetistoj, la memproklamitaj verkantoj de Vikipedio (ĉefe la franclingva), kaj la tuto de la pensmastroj (rimarku: se tiom da homoj eligas dubojn, tio eble rezultas de konspiro? Unu konspiro de la konspirteoriuloj, ĉu ne?) – flati al si la cerbon kaj trompi la publikan opinion kun, devige malveraj, “teorioj de la komploto”, fenomeno malracia kaj sekteca, klarigebla nur pere de psikoanalizo.

Konsekvence, kiel ni nur nun malkovras, *neniam estis iu ajn konspiro en la tuta daŭro de la historio!* Ni devos efektiviĝi plenan reviziisman referadon de ĉiuj ĝisnunaj historilibroj. La romiaj historiistoj, ĉu Tacito, Kasio Diono, aŭ Suetonio, kiuj parolis pri tio, estis kontraŭjuduloj, kiuj estis sekrete konspirantaj inter si por transformi Agripinon en porpekan kapron, kaj kies pensoj respondis al “bezono pri rea feigo de la mondo, kaj partopreni en reagordado de la kredoj kaj transcendo de la religiaj sentoj sub formo sekularigita” [*], ufl!

Tial do ne nur Klaŭdio mortis pro natura morto, kaj estas pro simpla amboneco, ke la kompatinda Nerono konsentis preni la pezan ŝarĝon de la Imperio anstataŭ tiu, kiu devus estis la heredanto: Britaniko, sed la “Konspiro de Pisono” neniam ekzistis, krom en la kapo de malsana paranojulo de la fia Nerono, kiu, ano de apokalipsema sekto, simila al tiu de la “Suna Templo”, amuzis sin juĝigante kaj ekzekutigante homojn lotitajn hazarde. Kaj rilate ties anstataŭigon per Galbo, ĝi estas, tutmemkompreneble, la rezulto nur de hazardo kaj malbona fatalo. Nur mensmalsanuloj, aŭ kontraŭjuduloj, povus imagi ke, vidante ke multege da homoj supertediĝis pri Nerono, kaj estis pretaj subteni alian imperiestron, Nymfidio, lia Prefekto de la Pretorio mem, “estus” promesinta riĉan *donativum* al ties pretoria gvardio mem, ke ĝi ŝanĝu je tendaro. Galbo, tutevidente ne deziris la potencon, kiu deziras la potencon? Neniu! Ĉiuj ja scias tion. Simple, Nerono, kiu kiel ĉiu scias, estis freneza, imagis al si ke estas

konspiro kontraŭ li, li suferis halucinojn, kaj nur ekkredis, ke lia pretoria gvardio sin turnis al la flanko de Galbo (kiu eĉ nenion sciis pri tio), kaj estis pelita de psikmalsana deliro, kiam li fuĝis. Liaj aŭdaj halucinoj eĉ kaŭzis, ke li kredis aŭdi armitojn provantajn nbatrompi la pordon, kaj lia korpo, malsolidigita per la varmo kaŭzata de lia cerboekscitiĝo, disfalis mem, kaj falis, malbonŝance – tio estas la Fatalo, ni ploru! – precize sur lian ponardon, kiun li estis samtempe – sed sen iu ajn rilato kun tio – elinginta, kaj li tranĉis al si la gorĝon, ne volonte, sed pro nura akcidento. Kaj nur ĉar li vidis la dramon, kiu plagis la respublikon sen imperiestro, Galbo sin oferis.

ROLAND PLATTEAU
Marto 2016

[*] Peter Berger



**Ne aŭskultu la komplotisman propagandon!
Tio vere estas banano.**

Sykes-Picot (*)

Abundas lastatempe la centjariĝoj ligitaj al la Unua Mondmilito, kiel ekzemple tiuj de la sarajeva atenco aŭ la armena genocido, aŭ tiuj, kiuj dum la venontaj semajnoj omaĝos la mortintojn en la bataloj de Sommo (1) kaj Verduno (2). Kaj post jaro kaj duono oni memorigos la Oktobran Revolucion, eble la plej influan okazaĵon de la 20-a jarcento.

Apud tiuj estas okazintaĵoj, kiuj ne aperas en la historilibroj aŭ havas tie nur kelkajn liniojn. La centjariĝo de unu el tiuj estis tiun ĉi semajnon (**): la sekreta Sykes-Picot-akordo, kiu grandparte klarigas tion, kio nuntempe okazas en Mezoriento. La brita kolonelo Mark Sykes kaj la franca diplomato François-George Picot estis la protagonistoj, kun enmiksiĝoj de reprezentantoj de la rusa caro, kaj ili interkonsentis kiel dividi la otomanan imperion post la milito. La konsekvencoj estis pli-malpli la nunaj Sirio (kun Libano) kaj Irako; ankaŭ la estontecon de Palestino [Palestino (NdR)] ĝi rimarkinde stampis.

Lunde fariĝis cent jaroj depost tiu akordo kaj, eĉ se ĉe ni oni ĝin malmulte menciis, en Mezoriento oni bone memoris ĝin. Unu el la simbolaj agoj de la Islama Ŝtato estis disbati la landlimon inter Sirio kaj Irako. La kurdoj en la praktiko same faris, favorante sian teritoriecon super la ŝtatoj. Pli emfaze en tiu ĉi semajno: la *pêshmerge*-batalantoj (3) forviŝis la surtere skribitajn nomojn Sykes-Picot kiel ekzemplo. Similajn iniciatojn entreprenis la kurdoj de Roĵavo en la landlimo mem. En Oslo ekzilitaj kurdoj


postulis sendependecon kontraŭ la Sykes-Picot-akordo. Kaj en la *Washington Post* Masrur Barzani verkis artikolon “Kurdio meritas interamikan divorcon disde Bagdado”: “Ni strebis vivi kun Bagdado, sed estas neeble”. Ŝajnas tute racie diri, ke ne eblas vivi en tiu ŝtato, kiu praktike malaperis. Fine, kiu volus havi sian domon en la nuna Irako?

Kvin jarojn post la Sykes-Picot-akordo, en 1921-a, la Traktato de Sevreso (4) antaŭvidis vojon por sendependa Kurdio. Sed, fronte al tiu mapo trudita de la okcidentaj potencoj, sendependemilito ekflamiĝis; miloj da kurdoj unuiĝis kun la turkoj. Dume, ankaŭ Mustafa Kemal Atatürk trankvile uzis la vorton Kurdio. La postulo estas konata: li kreis la modernan Turkan Respublikon kaj, per la ideo de ununura nacio, la forneadon de la kurdoj kaj la aliaj popoloj de Anatolio.

Superinte tiun laikan kaj militisman respublikon, nov-otomanan idearon eksponis Recep Tayyip Erdogan dum la unua jardeko de ties regado. Oni povus pensi ke li, intertraktinte kun Abdullah Öcalan, pretis agnoski kelkajn rajtojn al la kurdoj. Sed li same kunportis kaŝitan agendon: fundamente ŝanĝi la respublikon por atingi prezidentisman sistemon, kiu posedos la tutan ordonpovon. Ĉar ili estas la 20-25 % de la loĝantaro, li

bezonegis la alligitecon de la kurdoj. Antaŭ unu jaro la kurdoj ne akceptis tiun devigon vendi la demokration por atingi siajn rajtojn. Ili eniris kun forto la parlamenton kaj rifuzis esti parto de la plimulto, kiun Erdogan bezonis por ŝanĝi la konstitucion. Kaj tiam falis la masko kaj la monstro aperis sultaneske. Somere li ekflamigadis militon en Kurdio, kaj de tiam la situacio nur plimalboniĝis: Suro (5), la bela kvartalo de Amedo (6); Ĝiziro (7), scenejo de la ĉefa verko de la kurda literaturo; Ŝirneĥo (8), Nisebino (9) ... estas ruinigitaj. Eĉ impulsante militon, sektismon kaj dispartigon, Erdogan ne atingis la bezonatan plimulton dum la balotado, kiun oni refaris en oktobro.

Erdogan bezonis la parlamentan plimulton. Ĉar li ne ĝin havis, li prenis la finan solvon: elĵeti la kurdojn el la parlamento. Tion oni voĉdonis antaŭhierau en la parlamento, sub la preteksto forigi la imunecon de la deputitoj. Elĵetinte plejmulton el la deputitoj de la tria forto en la turka parlamento, li havos enmane prezidentecon, kiu ebligos ŝanĝi la konstitucion kaj akiri absolutan povon.



Limoj de la Sykes-Picot-akordo:
Ruĝe, areo sub brita influo.
Blue, areo sub franca influo.
Verde, areo sub rusa influo.

La kurdoj rifuzis elekti inter aŭtonomeco kaj demokratio. La unuan oni ne donas, la duan oni forprenis. Kaj senkaŝe oni vidigis al ili, ke ili ne havas lokon en la Turka Respubliko.

URTI URRTIKOETXEA

Tradukis: NXC. Junio 2016-a.

Klarigoj:

(*) saĵks-piko.

(**) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 22-an de Majo 2016-a.

Notoj (nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj):

(1) Somme, en la franca.

(2) Verdun, en la franca.

(3) Pêshmerge, kiu laŭlitere signifas

“mortalfrontanto”, estas nomo donita de la kurdoj al iliaj gerilanoj, milicanoj kaj, lastatempe, al la regulaj soldatoj de la Regiona Kurda Registaro en Suda Kurdio.

(4) Sèvres, en la franca.

(5) Sûr (Sur en la turka).

(6) Amed (Diyarbakir en la turka).

(7) Cizîr (Cizre en la turka).

(8) Shirnex (Sirnak en la turka).

(9) Nisêbîn (Nusaybin en la turka).

Reago al la recenzo *La bunteco de anarkiismo en Hispanio* (2)

Nun ni iom historiumu en rilato al la de Lins nomata “hispana tragedio”, por loki la leganton en ĝia kadro. En Hispanio, la 12an de aprilo 1931 okazas municipa balotado, en kiu venkas la respublikanoj. La reĝo Alfonso la 13a abdikas la tronon kaj foriras el Hispanio. La 14an de aprilo estas proklamita la Dua Hispana Respubliko. Jam de tiu momento la eklezio senkaŝe kaj senĝene deklaras sin preta batali kontraŭ la novan reĝimon, starigitan pro la suverena volo de la popolo. Apenaŭ du semajnojn poste, la primaso de Hispanio, Pedro Segura, violente vortatakas la novajn regantojn. La posta paŝo estas la kreo de katolika partio, Popola Agado, taŭga por defendi la ekleziajn privilegiojn kaj por detruigi la demokratian respublikan ordon. Gvidas ĝin José María Gil-Robles, kiu fiksas sian atenton sur Dollfuss, la social-kristanisma partiestro, kiu starigis la aŭstran korporacian ŝtaton, nome aŭstre faŝisman reĝimon, al kies skemoj Gil-Robles intencas konduki Hispanion.



José María Gil-Robles

En 1933, ligante aliajn katolikajn grupojn kun Popola Agado, Gil-Robles kreas la partion CEDA (Hispana Konfederacio de Aŭtonomaj Dekstrularoj), kiu venkas en la tiujara novembro elektado, kvankam per magra plimulto da voĉoj. Kaj ĉi tio devigas Gil-Robles gradigi laŭ fazoj sian planon regi unuope por ŝanĝi la respublikan konstitucion kaj poste aŭ krei korporacian ŝtaton laŭ la aŭstra modelo aŭ restaŭri la monarkion. Komence CEDA limigis sin apogi la registaron de la radikaluloj de Alejandro Lerroux, fakte reakciuloj, kies radikalismo troviĝis nur en la nomo de ilia partio.


Kaj ekis la tiel nomata nigra jar-duo (de novembro 1933 ĝis aprilo 1936). Hispanio regresis: la agraran reformon, timide iniciatitan de la respublikana-socialista koalicio reginta dum la t.n. progresema jar-duo (1931-1933), oni forĵetis en rubujon; terposedantoj maldungis milojn da laboristoj, la salajroj estis frostigitaj, eĉ duonigitaj, por la terkulturistoj, la ekonomio inflaciis... Tiukadre havis lokon la t.n. Asturia Revolucio. La reganta koalicio CEDA-Radikala Partio eĉ ne unu momenton hezitis pri venigo el Nord-Afriko de la sovaĝaj Maŭraj Trupoj, konsistigitaj de magrebanoj el la maroka regiono sub hispana protektorato, kune kun la Fremdula Legio, por ke ili dispremu hispanojn, kiujn malsato kaj mizero trenis al revolucio. Ilin komandis la generaloj Franco kaj Goded, kiuj malpli ol du jarojn poste, rompante sian vorton, puĉis kontraŭ la Respublikon kaj



Rigoberto Domenech

iniciatis la Hispanan Enlandan Militon (1936-1939). Jen la rezulto: 2 000 ĝis 5 000 buĉitoj kaj 40 000 arestitoj, koncentrejoj, torturoj...

La triumfo de Popola Fronto (koalicio el maldekstremaj respublikanoj, socialistoj kaj komunistoj) en la elektado de februaro 1936 turnis la sidejojn de la dekstrulaj partioj, la kazernojn kaj la preĝejojn en konspircentrojn. Tiu triumfo transiris la limon, kiun la hispana oligarkio kot-anima, kruda, bigota, integrista kaj ridinda pretis toleri. Kaj ĝi organizis la puĉon. Antaŭ ol ĉi tiu okazis, la eklezio kontribuis al ĝia sukceso liverante monon al la puĉistoj. Kiam la insurekcio eksplodis, ne magra nombro da pastroj prenis la fusilon kontraŭ la Respublikon. Ĝis tioma



Pio la 12a

grado, ke en la diocezoj de Ávila kaj Burgos la faŝismaj aŭtoritatoj devis admoni ilin pro ties “senmezura sinferemo”.

Apenaŭ tridek tagojn post la eko de la konflikto, Rigoberto Domenech, la ĉefepiskopo de Zaragozo, urbo, kie la faŝistoj murdis pli ol 6 000 homojn en la unuaj monatoj post la komenco de la milito, deklaris jenon: “Violenton oni faru ne je la servo de la anarkio, sed, lice, por la bono de la Ordo, la Patrujo kaj la Religio”. Kiam eĉ alilandaj anoj de la katolika tendaro klamis al la ĉielo pro la cinika partianeco de la hispana eklezio al la ribeluloj, la sankta institucio sinpravige ellaboris dokumenton, kiu por ĉiam restos kiel pruvo de la hontinda subteno de la hispana katolika hierarkio al la krima faŝisma puĉo en 1936. La dokumento titoliĝas Kolektiva letero de la hispanaj episkopoj al la episkopoj en la tuta mondo rilate al la hispana milito. El tia monumento al la indignindaĵo, mi



Franco sub baldakeno

mencios nur unu perlon. Ĝi konsistas en pravigo de la milito, t.e. de morto, sufero, mizeroj... Jen kiel la hispanaj episkopoj pledis por la morto-dona milito de fratoj kontraŭ fratojn: “Kaj tielas la homa kondiĉo kaj la ordo de la Providenco – sen ke ĝis nun eblus trovi anstataŭaĵojn – ke, kvankam la milito estas unu el la plej teruraj katastrofoj por la homaro, fojfoje ĝi estas la heroa ununura rimedo por centri la aferojn en la kadron de justo kaj ilin revenigi al la regno de la paco. Tial la Eklezio, kvankam ido de la Pacprinco, benas la emblemojn de la milito, fondis la Milit-Ordenojn kaj organizis Krucmilitojn kontraŭ la malamikojn de la fido”.

La hispanaj anarki-sindikatistoj reagis al la puĉo proklamante la revolucion en kelkaj partoj de Hispanio. Ĉu oni faris murdojn de pastroj? Sendube, jes. Ĉu mi kondamnas tion? Kompreneble, ke jes! Mi kondamnas ajnan barbaraĵon faritan nome de anarkiismo, unu el la plej belaj, noblaj kaj humanaj idealoj ŝprucintaj el la homa menso. Sed pastrojn murdis ne nur anarkiistoj, aŭ “revoluciuloj”, laŭ la termino uzita de Lins. Pastrojn murdis ankaŭ la faŝismaj-katolikaj ribeluloj, en la okazoj, kiam tiuj pastroj tenis sin lojalaj al la laŭleĝa Respubliko.

En la ekscesoj kaj krimoj plenumitaj de la faŝistoj en la ribelula ariergardo, piaj katolikoj ĉiam vidis punkton de pravigo: “ruĝuloj estas demonoj”, kaj punkton de noblo: “ni ja mortigas ruĝulojn, sed preĝas por ties animo”. Kelkaj eĉ transiris ĉiujn limojn praktikante sian piecon. Ekzemple, en Triana, renoma kvartalo en la urbo Sevilo, membroj de la Fremdula Legio faris enorman krucon el kadavroj de murditaj respublikanoj kaj “revoluciuloj” por prui sian devotecon.

En 1939, kaj la anarkiisma revolucio kaj la Respubliko estis definitive renversitaj de la ribeluloj. Ĉi tiuj ŝuldis sian venkon al la malavara helpo de Hitler kaj Mussolini kaj al la priplorinde fia konduto de la eŭropaj demokratioj, kiuj, anstataŭ apogi la fratan Hispanan Respublikon, kunaŭtoris la hontruĝigan Traktaton

pri neinterveno, malgraŭ, ke ili sciis, ke la itala faŝismo kaj la germana naziismo forte kaj efike kunlaboras kun la puĉistoj en la masakrado de la hispana popolo.

La hispanan enlandan militon la eklezio deklaris “Krucmilito”. Post ĝia fino, sur la muroj de multaj preĝejoj videblis memorigaj ŝtonoj kun listoj da nomoj sub la titolo “Falintoj por Dio kaj por Hispanio”. Kompreneble, en tiuj listoj troviĝas nur nomoj de homoj batalintaj en la tendaro de la puĉistoj. La problemo estas, ke ankoraŭ hodiaŭ, en la nuntempa demokratia Hispanio, tiuj memorigaj ŝtonoj surmuris samloke. Kaj la nuna eklezio ne hontas. Kaj la aŭtoritatoj tion permesas. Ĉu imageblas io tia en la nuntempa Germanio rilate la nazian epokon aŭ en la nuntempa Italio rilate la faŝisman?

Memkompreneble, pro sia enorma kaj senkondiĉa helpo, la sankta organizo nepre ricevis rekompencan. En la Hispanio de la venkintoj, al la katolika eklezio oni asignis rolon eĉ pli gravan, ol tiu ludata de la strikte politikaj instancoj, se eblas koncepti ambaŭ instituciojn disaj. La eklezio diktis kion ni hispanoj povas senti, diri kaj fari: kiom longu la juĝoj de la teatrolinoj, kiom larĝu iliaj dekoltaĵoj, kiujn filmojn decas spekti, kiujn librojn ni rajtas legi...

En 1953, la diktatoro Franco kaj la papo Pio la 12a subskribis konkordaton, kiu donis al la eklezio supermezurajn privilegiojn ĉiuspecajn: jurajn, fiskajn, instruajn, armeajn... Kompreneble, la episkopoj uzis ĉiajn rajtojn. Sed ili ne uzis la enorman povon, kiun la naci-katolikisma Hispanio donis al ili, por savi almenaŭ kelkajn el la miloj da torturatoj, enkarcerigoj, mortkondamnitaj... pro politika “elpurigo”. Neniu el ili aplikis ĉi-koncerne la “kristanan karitaton”, kiun ili predikis. Nur en la unua jardeko post la milito, pli ol 50 000 homoj estis murditaj de la naci-katolikisma polica ŝtato, ne pokaj el ili pro informoj kaj denuncioj far pastroj kaj monaĥ(in)oj.

En la reto, troveblas indigniga grafika materialo, per kiu la hispana religia hierarkio kondamnas sin mem: fotoj de episkopoj levantaj faŝismasalute brakon al ribelintaj militistoj aŭ al la krimulo Franco preĝeje paŝanta sub baldakeno (sakralaĵo rezervata nur al la bildoj de la sankta madono, de la sanktuloj kaj de la monstranco, nur

kiam ĉi tiu entenas konsekritan hostion, kiu, laŭ katolika kredo, estas la korpo de Kristo).

Tamen la eklezio neniam pardonpetis pro sia responso en la puĉo, en la milito kaj dum la kvardekjara naci-katolikisma subpremado kaj masakrado de hispanoj. Tute male. Temp-al-tempo, en la nuno, Vatikano beatigas “martirojn el la

krucmilito”. Sed ĝi ja neniam beatigos iun ajn el la homoj, kiuj falis defendante la laŭleĝan reĝimon balote elektitan de la popolo. Ĝi ne beatigos iun ajn el la miloj da katolikoj tial torturitaj kaj paf-mortigitaj ne de anarkiistoj, sed de siaj samreligianoj en la naci-katolikisma Hispanio. Ĝi neniam beatigos iun ajn el la multaj pastroj, inter ili la jam famaj “eŭskaj

pastroj”, murditaj ne de anarkiistoj, sed de siaj samreligianoj pro tio, ke ili tenis sin lojalaj al la Respubliko.

Nur se iam tio okazos, mi agnoskos, ke efektive io en Vatikano komencis ŝanĝiĝi.

Amen.

MIGUEL FERNÁNDEZ

Operacio “Neimageblo”

Printempe kaj somere de la jaro 1945, Britio kaj Usono preparis planon pri neatendita agreso kontraŭ Sovetio. Tio fakte fariĝus komenco de tria mondmilito. Tiu ĉi neimagebla malnoblaĵo estis fiaskigita lastmomente, kaj en tio ĉi estas ne malgranda merito de la sovetia informa servo.

Taksante, ke Sovetio estas minaco por la tuta okcidenta mondo, Churchill (ĉerĉil) ordonis al stabestroj de britaj armeaj fortoj ellabori planon “Neimageblo”. Tiu ĉi plano trafis sur lian tablon la 22-an de majo 1945.

La operacio “Neimageblo” laŭplane devis komenciĝi la 1-an de julio 1945. En tiu tago 47 britaj kaj usonaj divizioj sen deklaro de milito devis fari neatenditan ruinigan baton kontraŭ sovetiaj armitaj fortoj, kiuj ne atendis tian malnoblaĵon fare de siaj hieraŭaj aliancanoj. Tiun ĉi atakon subtenus 12 germanaj divizioj, kiujn Britio kaj Usono tenis ne-dissolvitaj en Schleswig-Holstein (ŝlesviĥ-holŝtajn) kaj en suda Danio. Ilin trejnadis britaj instruktoroj prepare al la venonta milito kontraŭ la rusoj. Britio kaj Usono povis kalkuli je neatendo de ataka bato, senduba supereco en maroj kaj preskaŭ duobla superpezo de

strategia aviado. Forton kaj kapaciton ili klare pruvis per amasaj bombardadoj, tute ruinigante Dresdenon. El milita vidpunkto, tiu ĉi barbaraĵo ne havis ian ajn sencon, ĉar en la urbo mankis eĉ iom da gravaj militaj kaj industriaj objektoj. Tio estis, antaŭ ĉio, alia ne-dubsenca averto al Sovetio, ke la sama sorto povas trafi Moskvon, Leningradon kaj aliajn grandajn urbojn.

Kembriĝa kvinopo

Feliĉe, la sovetia armea komandantaro ĝustatempe eksciis pri tiu ĉi infera plano de Churchill. La plano de la operacio “Neimageblo” estis transdonita al Moskvo. Ĝin transdonis la kembriĝa kvinopo. Tian nomon havis la kerno de la reto de sovetiaj agentoj en Britio, kiuj estis varbitaj en la kembriĝa universitato en la 1930-aj jaroj. La kvinopon de Kembriĝo la direktoro de la kaŝesplora servo de Usono (ekde la jaro 1953 ĝis la jaro 1961), Allen Dulles (dalles), nomis “la plej forta kaŝesplora grupo dum la tempo de la Dua Mondmilito”. En la kvinopo estis Kim Philby (filbi), Donald Maclean (maklin’), Anthony (entoni) Blunt, Guy (gaj) Burgess (berdĝess) kaj John (ĝon) Cairncross (kernkross). Ĉiuj kvin devenis el bonhavaj aristokrataj anglaj familioj; ili estis finstudintoj de la prestiĝa kembriĝa universitato. Ĉiuj ili estis en altaj postenoj – en la britaj kaŝesplora servo kaj diplomataj strukturoj havis aliron al plej sekretaj informoj. Estas tute ĝuste, ke mono ne interesis ilin. Laŭ vortoj de kolonelo Yuri (jurij) Modin, kiu estis la kuratoro de la kembriĝa kvinopo, la angloj kunlaboris kun sovetiaj organoj de sekureco volontule kaj neprofitcele: “En la jaro 1944 estis farita decido pri



Donald Maclean

pago al ili de grandaj ĉiumonataj subvencioj – io simila al pensioj. Ja neniu prenis, ĉiuj rifuzis. Ne por tio ĉi ili laboris.”

Verŝajne, tiuj ĉi junuloj vidis en Sovetio la solan realan forton kapablan lukti kontraŭ faŝismo. Krom tio, en la komenco de la 1930-aj jaroj en Eŭropo ekfuriozis fortega ekonomia krizo, kiu kaŭzis amasan senlaborecon kaj akriĝis socialajn konfliktojn. Evidentas, ke la kvinopanoj, venintaj el riĉaj familioj, sentis respondecon pri la mizera vivo de la plimulto de siaj samlandanoj, ideojn de komunismo ili opiniis justaj, kapablaj certigi al la



Kim Philby



Guy Burgess



Anthony Blunt

homaro helan estontecon. Dum la Dua Mondmilito, la kembriĝa kvinopo akiris por Sovetio ne malmulte da unikaj sekretaj dokumentoj, interalie pri atomaj armiloj. Tamen, la plej grandan valoron havis transdono de planoj pri la operacio “Neimageblo”. Tio ĉi donis eblon preventi trian mondmiliton.

Dank’ al la informoj, kiujn transdonis la kembriĝa kvinopo, la sovetia komandantaro sukcesis uzi adekvatajn

rimedojn de kontraŭagoj. Ricevinte ordonon el Moskvo, la ĉefkomandanto de la grupo de sovetiaj okupaciaj militistaj trupoj, Georgij Ĵukov, la 29-an de junio 1945, neatendite por Britio kaj Usono, ŝanĝis la dislokiĝon de siaj taĉmentoj. Post tio ĉi, eĉ paroli pri ajna neatendita bato fariĝis maleble. Ankaŭ la ĉefmotoro de la operacio “Neimageblo”, Winston Churchill, malvenkita dum elektoj en la somero de la jaro 1945, devis forlasi la politikan scenon. Al la regpotenco en Britio venis la Laborista Partio, kiun gvidis Clement (klement) Attlee (ettli), kiu estis pli lojale agordita rilate al Sovetio kompare kun sia antaŭulo.

Post tiam, planoj de milito kontraŭ Sovetio ellaboriĝadis (kaj estas ellaborataj) sur la nivelo de NATO.

VIKTOR MEDNIKOV

Publikigita en la ĵurnalo “Vesti” en aŭgusto 2016. Resume tradukis el la rusa Andris Natinŝ.



John Cairncross

Franjo Vokoun

Enkonduke mi menci, ke en la jaro 1961 membriĝis iomete granda grupo da ĝejunuloj el la t.n. “Terena Unuo” de la Kroatia Ruĝa Kruco en la montgrimpa kaj turisma societo “Naturamiko”. Inter ili estis ankaŭ mi. Prezidanto de la societo estis tiam s-ro Franjo Vokoun! Li estis samtempe, apud la aliaj esperantistoj el la rondo de “Laborista Esperanto-Societo” (LES) – s-roj Josip Vajdlih, Mirko Tandarić ktp, batalanto por la lingvo Esperanto. Iom post iom ni montgrimpantoj eniris Esperanto-sekcion de la societo “Naturamiko” kaj familiariĝis kun Tutmonda Asocio Naturamikoj - Esperanto-Fako (TANEF). Kiam malfortiĝis nia montgrimpa societo kaj la plej granda parto de la maljunaj membroj foriris kaj pli junaj progresis en sia studado, post la invito de s-ro Vokoun iuj, inter kiuj estis mi, membriĝis en ES “Bude Borjan”.



Kroata Montgrimpa Asocio

S-ro Vokoun naskiĝis en Varaždin la 3-an de decembro 1909, en la sama jaro kiam ekfloris nia kroatia Esperanto-agado... Laŭ la metio li estis tajloro kaj vivis en diversaj urboj. En 1929 li venis al Zagreb kie li en la jaro 1933 esperantistiĝis en la laborista montgrimpa kaj turisma societo “Naturamiko” (Prijetelj prirode). Unu jaron poste li eniris en laboristan Esperanto-societon kaj ĝis sia forpaso li estis membro de “Sennacieca Asocio Tutmonda” (SAT). Kiel membro de la t.n. unuiĝo “Ekskursna Domo” li partoprenis en la konstruado de la montgrimpa domo sur la okcidenta montoparto de Medvednica – Glavica. Post la Dua Mondmilito li renovigis la societon “Naturamiko” kaj estis unu inter la fondintoj de ES “Bude Borjan” kaj Kroatia Esperanto-Ligo, kie li estis siatempe ankaŭ prezidanto de ambaŭ unuiĝoj. Lia aktiveco en Esperantorondo en tiama Jugoslavio kaj en la monda movado estis tre grava kaj tre ampleksa, ni menci nur parton: li skribis por la gazetoj “Voĉo”, “Homo kaj kosmo”, “La suda stelo” (poste “Jugoslavia esperantisto”), “Sennaciulo” kaj “La migranto”. Dum la 38-a Universala Kongreso en Zagreb 1953 li estis membro de la redakta komitato.

Lia agemo estis ankaŭ turnita al skribado por nacilingvaj gazetoj. Menciende estas, ke li skribis la libron pri la 60-jara agado de la societo “Naturamiko” (kroatlingva titolo: “Prijetelj prirode 1924-1984”, eld. Zagreb, 1984.) S-ro Franjo Vokoun mortis en Zagreb la 23-an de septembro 1985.

RADENKO MILOŠEVIĆ



Franjo Vokoun

Bela stratribelo

Mi legis la libron “Socialismo fareblas” de Cockshott kaj Cottrell, nove eldonitan libron (eld. MAS, ISBN/ISSN9782369600091, 337 paĝoj, 2015). Mi ne faros recenzon pri tiu libro, ĉar estus tro komplike por mi. Mi nur faros rimarkon: en la komenco oni montras la tutajajn statistikojn pri la nacia ekonomio (de Britio, sed mi konjektas, ke la faktoj estas similaj en ĉiuj landoj de okcidenta Eŭropo). Se oni forigas la materialajn kaj rimedajn kostojn, nur la duono de la plusvaloro iras al salajroj plus malrektaj salajroj, do se lando estus regata *juste* oni povus: ĉu kreskigi la salajrojn je duoblo!, ĉu malpliigi la prezojn je duono! ĉu malkreskigi la produktiv-econ de la laboro je duono!

La tria solvo estas tiu pri kiu oni malplej pensus, tiom ni estas ĉiuj cerbolavitaj pri “produktiveco”, “modernigo”, honto pri neefikeco, “pigreco” ktp, sed ni liberigu iom niajn neŭronojn! Kial tio estus tiom evidenta? Kiam en la nunaj tempoj ni vidas la konsekvencojn, ne nur en terminoj de sendungeco, malsekuro, malegaleco de fortorilatoj dunganto/dungato, sed ankaŭ malfaciligado de la vivo de la uzanto de servoj ĉu publikaj ĉu komercaj! Ĉu vere estas tiom evidente, ke oni devas forigi ĉiam kaj ĉie homojn kaj anstataŭigi per maŝinoj (aŭ per nenio, vokcentraloj, kontrolo vin vi mem, ktp) jen, mi pensas, vojo pripensenda.

Do nur kiam la du skotaj aŭtoroj parolas pri la etoso en Skotlando dum la jaroj Thatcher-aj, kaj elvokas la fifaman kapimposton, *Poll Tax*, kiun provis enkonduki Thatcher, kaj kontraŭ kiu la tuta popolo ribelis, kaj kio estis la ununura malvenko de Thatcher, mi memoris pri gazet-artikolo, kiu prezentis la etoson en la

popolaj kvartaloj de Anglio dum ĝi, do jen:

Bela stratribelo

Rememorigu nin, antaŭ 15 jaroj (skribita en 2004), en 1989, la ĝojiga stratribelo ekkaŭzita en Britio fare de la *Poll Tax* de Thatcher montris la validecon de popola ribelo. Ni plu ŝercu. Vivo finfine ridetas al tiuj, kiuj scias, ke digno ne estas fleksiĝemi sub la botoj.

Beltagon mi forvojaĝis en Anglion, kaj mizero reatingis min. En subtere-taĝo kun nur kelfenestro al iu fervojo, mi memoras tiun elektromezurilon, kiu spitis al mi. La aĝo funkciis nur se oni enigis en ĝin 50-pencajn monerojn tra fendon. Tiomlonge, kiom vi havis enpoŝe du oklaterajn monerojn, vi povis pretendi je varma duŝado. Sed se malfeliĉe via kredito elĉerpiĝis dum la afero, vi devis eliri saĝaŭmovestita por serĉo al tia monereto. Plimalbone: se vi estis forgesinta farigi por vi tiamoneran vian monon, endis eliri vaporfumanta en la straton, aŭ anoncsonori ĉe porde de via etaĝa najbaro. Kaj tio havigas al vi malamecan senton. Tiom, kiom la aŭtomataj elprenoj de “Francio-Telekomunikado” aŭ la kontrakto, kiu ligegas vin je via poŝtelefono tiel, kiel je katenkuglego. La sento, kiu plenigas vin, estas tiu esti transirigaĉita al servuteco. Tiam, kiam la vivkondiĉoj iĝas tiom aĉaj, ke homoj impetas en stratojn, vi kuniĝas je l’ amaso por plivarmigi vin. Tio okazis al mi en la jaro 1989. Jes, ĝuste du jarcentojn post la sturmado de La Bastille. Maggie Thatcher estis pistanta la malalt-tavolan popolon kun spirhaltiga aroganteco: ŝi dispecigis la armeon de ministoj, ŝi superŝuldigis la familiojn insidlogante ilin akiri posedon de la



Margaret Thatcher

propra domo, kaj poste altigis la rentumon, kaj nun ŝi surklabas la plebon per feŭdeca imposto, la *Poll Tax*... Per tiu “loka imposto” kalkulita po unu ulo, kapimposto, nobelo sola en sia kastelo estus pagonta kvarfoje malpli ol kvaropa familio enŝtopita en domaĉeto. Cetere, ĉar tiu imposto estus mastrumota de la urbestroj, en la malriĉaj lokoj la imposto estus pli alta! Jes ja: por ebligi pagi la servojn kiujn bezonas malriĉuloj. Logikas: la riĉuloj dungas vartistinojn, ili ne bezonas bebovartejojn, nek soci-helpejojn, do ili pagos malpli da imposto. La malriĉuloj mem financos siajn edukistojn, kaj policistaĉojn...

Surstrate Anglio rebatas tiun insulton energie. Stratbataletoj eksplodas en la malprivilegiaj kvartaloj kaj mizerigitaj urboj de Nord-Anglio. Poste granda nacia manifestacio aranĝitas en Londono, dum sunplena sabata postagmezo. Venintaj de la tuta lando centmiloj da “servutuloj” malkontentaj kolektiĝas. Neniam mi





forgesos tiujn avinjojn el Liverpool kun iliaj flagrubandoj postulantaj la revenon de Robin Hood. Vastega irantaro, kie kubut-al-kubute vidiĝas la sperto de l' maljunaj kaj energio de l' plijunaj. Perforto eksplodas kiel eble plej frue. Komence oni ŝtonumas la rezidejon de Thatcher, poste oni ekatakas la luksajajn butikojn. La policistaro baldaŭ estas superkvantigita. Kiam ili sturmas, por zonkapti frakasinton, tiu enigis sin en la manifestaciantaron, kaj tiu ĉi refermiĝas malantaŭ li tiel kiel ostro. Kiam la policistoj aŭdacas eniri ĝin, la amaso el avĉoj kaj avinjoj, el patrinoj kaj infanoj malfermiĝas sub ties premo, sed malfermiĝante desegnas subridan labirinton, kie ili devojiĝas maldirekte al kien malaperis ilia predo. Sur Oxford Circus, maljunulino kaptas min perbrake por savi min el policista sturmo. "Ne kuru, juna sinjoro, nenion vi havas por kulpiĝi." Ni malproksim-

iĝas kune per kvietaj paŝoj meze de l' tumulto de l' kunpuŝiĝado, de l' frakasitaj montrofenestroj. "Tiu leĝo ja estas tro maljusta, ĉu ne, juna sinjoro?" Ĉe noktiĝo ne plu estas marŝantaro, sed plu estas la stratoj plenplenaj je homoj. Homoj scivolemaj kaj parolemaj, kiuj trapaŝas *West-End*-on plengorĝe kantante, kaperante la *pub*-ojn kaj naskante miloble pli da amindumadoj ol ordinara sabato-vespero. Stranga liberosento, kiu nin konsciigas tiomgrade kiom tiuj stratoj kutimtempe ne apartenas al ni. Timegante antaŭ tiu ĝua maldisciplinado la Instanco ordonas tujan fermon de la trinkejoj. Fatala eraro! La policistaĉoj, kiuj sturmas en la *pub*-ojn, estas akceptataj de festularo hipersentema, kiuj tute ne eltenas, ke oni venu ĉesigi tian solenadon. Multnombraj *bobby*-oj eliras el tiuj lokoj la vizaĝon skrapŝirita de la furiozulinoj. La morgaŭa gazetaro nombras la

vunditojn, sed ankaŭ la multajn okazojn da nervkrizo kaj spleniĝo inter la ordofortoj... Kaj ĝi malaprobas la malnoblajn instinktojn de la furiozanta homamaso. Kaj veras: la festo estis grandioza. La *Poll Tax* malfondotas kaj la regado Thatcher-a baldaŭ ĉesos, sed la plej grava afero estas la ĝenerala fervoro, kiun neniu partopreninto neniam forgesos. Al tiuj, kiuj dubas pri niaj sukcesoŝancoj, indas rakonti tiujn belajn tagojn, kaj diri, ke la vera venko kuŝas en la plezuro, kiun oni ĝuas pro batalo. Tiun tagon niaj malnoblaj instinktoj revekis memfidon ĉe popolaĉo iĝinta reĝo. Amaso mala je tiu de l' vulgaraj tagoj, je tiu submetita kaj brutita kiel tondota ŝafgrego. Bela stratribelo? Ĝin provi estas ĝin elekti.

NIKOLAO ARRAITZ

Publikigita en CQFD n-ro 11, aprilo 2004
Esperantigis Roland Platteau 6/10/2004

NEKROLOGO

Friedel Bues

Laŭ informo de la institucio, en kiu Friedel kun sia edzino Ilse vivis dum la lastaj jaroj, Friedel mortis en la 2016-09-09 en la aĝo de 93 jaroj, neatendite. Dum 69 jaroj li membris en SAT (matr. 24273) kaj vizitis kelkajn kongresojn.
Informis Hans Rodewig

Henriko Graven

La 6an de marto 2016 forpasis en Paŭo k-do Henriko Graven (matr. 35840).

Li aliĝis al SAT en 2007 kaj partoprenis tiujare la kongreson apud Parizo. Li ankaŭ estis unu el la organizantoj de la SAT-Amikara kongreso en Paŭo en 2009.

Ege entuziasma liberpensulo, li aktive varbis por Esperanto en tiu ĉi medio, interalie per partopreno en liberpensulaj vespermanĝoj en la urboj, kie SAT-Amikaro okazigis sian kongreson.

Esperantistoj kaj liberpensuloj omaĝis al li dum la funebro, kiu okazis la 11an de marto.



Henriko Graven
far Serĝo Sir'



Jeremy Corbyn

Pri antisemitismo

Ege interesa numero. Tiu reago “Mi estas ŝokita” pro *antisemitismo* estas absolute tipa por la kalumnioj, kiujn faras la Blair-anoj de la Laborpartio en Britio kontraŭ Jeremy Corbyn. Oni dufoje suspendis eminentajn membrojn pro tiu *antisemitismo*, kiam ili nur citis judojn mem! La tuto estas artefare kreita, kaj oni povas tion rekoni, kiam la plendanto ne kontestas la faktojn, sed nur daŭre diras, kiom ŝokita li estas.

La maldekstraj organizaĵoj en Britio ne kuraĝas surtreti tiun terenon. Eĉ la koalicio *Ĉesigu la Militon* evitas diskuti pri la veraj kaŭzoj de militoj, kiel la dokumento *Clean Break* [Rekta rompo] [*] de 1996, en kiu la novkonservativuloj antaŭvidis la invadon de Irako kaj Sirio, ĉar “tio proksimiĝas al *antisemitismo*”!

IAN FANTOM

[*] A Clean Break: A New Strategy for Securing the Realm [Rekta Rompo: Nova Strategio por sekurigi la Regnon]

Kiu ekmilitadas aŭ preparas pacon?

Kiel skribis Sonja van den Ende (Sennaciulo, majo-junio 2016), Usono kaj EU-aj landoj milite ekatakas multajn landojn. Ankaŭ Rusio. Ĝi ekmilitis en Afganio. Poste venis Usono kaj ĝiaj EU-aj vasaloj por eldetruir ruinrestaĵojn. Ni ankaŭ memoru: Afganio tenas grandan produktadon de drogoj. Ŝajne, la mondaj regnoj malpermesas la komercon per tiuj varoj, kiuj multe profitigas al tria aktoro ekster ĉiuj regnoj. En ombro, ĝi riĉiĝas per ĉiaj komercoj, inkluzive de tiu pri armiloj, lavadas cerbojn per propagando kaj reklamo, kaj finfine, direktas ĉiujn regnojn.



Milito utilas al ĝi por armil-konsumado kaj terorizado de popoloj ĉar, terorizitaj, ili ne cerbumas, bone obeas, submetiĝas, englutas propagandon. Ĉefe, ili ne devas malfermi la okulojn ĉar, se jes, ili ekvidus la mensogojn de la reganta kasto kaj, eble, ribelus.

Sed, kio direktas la potenculojn mastrantajn la homaron? Nur la spirita mizero kreita de malbona estado. Homoj timegante sian intiman dezerton, sin vidante solaj kiel neniaĵo perdita en la universo, serĉas kompenson per ŝajnado kaj potenco.

Kiam ni sentas ke, eĉ polvereto, ni entenas veran universon kaj egan energio-flusadon, ni forlasas nian karapacon ŝajnantan fortecon.

Ni kuraĝu montri nin nudaj, sentemaj, ŝatantaj amon kaj homan komunikadon! Tiam, paco florados!

Karaj geamikoj. Mi kredas, ke kondamni Usonon kaj kvazaŭ-diigi Rusion ne helpas pac-floradon ĉar tio maceradaĉas en naciismo, fonto de militoj, eĉ se mi komprenas la reagon kontraŭ la usona imperiismo direktata de la kaŝita potencularo.

MICHEL MARKO

LANDAJ PERANTOJ

Aŭstralio – Franciska Toubale

1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au

Belgio – Claude Glady

Rue du Culot, 1, BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916

Rete : cglady@arcadis.be

Bankkonto : 750-6373051-18

IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22

Bosnio-Hercegovino – Ivica Horvat

Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba

Brazilo – Alex Sousa Santos

Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo

rete : esperanto1000@gmail.com

tel. (poŝa) : +557 7988011780

Britio – Arturo Prent

7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1.277.22.89.62

Nomo : "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"

Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003

BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003

rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk

Bulgario – Metodi Markov

Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario

tel. (fiksa) : +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403

rete : mam1948@abv.bg

IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF

Ĉeĥio – Václav Stibůrek

J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio

tel. : +420.737230231, rete : stiburekv@seznam.cz

IBAN : CZ6620100000002900048738

BIC/SWIFT : FIOBCZPPXXX

Ĉinio – BRUNO GUY CLAUDE HENRY

rete : esperanto.bhenry@yahoo.fr

Bankkonto N°6217857500009246684

SWIFT kodo/BIC : BKCHCNBJ970

BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong

Road (M) CHANGSHA - HUNAN - ĈINIO

Danio – HENRIKSEN Kim

Hallandsgade 6; DK-2300 COPENHAGEN

rete : kimjezus@gmail.com

Francio – Barthélémy Maurau

Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE

FR-27000 EVREUX, Francio

rete : barthelemy.maurau@free.fr

Bankkonto : 1733310 N 020

IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070

BIC : PSSTFRPPPAR

Germanio – Dominik Schramm

Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO

rete : dominik.schramm@gmx.net

Hispanio – Pedro Maria Sanz Sanz

C/Mar de Fora 13, esc.izqda., 3-B, ES-28400 Collado

Villalba, Hispanio

rete : pedrosanzsat@gmail.com

Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)

IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726

BIC: BBVAESMM

Hungario – Tóth Zsolt

Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario

Tel : +36-20-5188919, rete : zstoth75@gmail.com

Bankkonto : 11773377-00000354

IBAN : HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000

BIC : OTPVHUHB

Italio – Carlo Bourlot

Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio

rete : carlo.bourlot@gmail.com

Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993

Poŝtkonto : n-ro 43976158

Kodo IBAN : IT8820760101000000043976158,

Kodo BIC : BPPIIRXXXX

Izraelio – Jehošua Tilleman

97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio

rete : b48705544@013.net

Japanio – Nakamura Daišin

Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo

rete : sat-peranto-japana@googlegroups.com

Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon

Koreio – Jung Hyunsoo (Paz)

Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu

KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do

rete : paze23@gmail.com

Kroatio – Ivica Ščepanović (Truto)-poŝte

Otok Brac, HR-21414 Gornji Humac, Kroatio

Tel : +385.21.647.059, Poŝtel : +385.098.182.79.07

rete : ivica.scepanovic@stt.com.hr

Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka

IBAN : HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC : SOGEHR22

Litovio – Gražina Opulskienė

Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio

Tel : +37068736457, rete : grazopul@yahoo.com

Bankkonto : LT347300010001720030

BIC/SWIFT kodo : HABAL22, Swedbank

Malagasio – Justine (Lala) Ralalarisoa

Lot IIC - 72 - FD Manjakarary, MG-101

Antananarivo, Malagasio

rete : lrespr@libero.it

IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112

BIC : BMOIMGMG

Norvegio – Cécile Anda

Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio

Portugalo – Manuel Luis Pedrosa Alves

Estrada Principal, 79, Morelino, PT-2710 Sintra, Portugalio

rete : morelino_sintra@hotmail.com

Rusio – Nikolao Gudskov

a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio

rete : nikolao@orc.ru

Svedio – Inga Johanson

Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio

rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com

Poŝtkonto : Svenska arbeteesperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8

IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608

BIC : NDEASESS

Svisio – Richard Schneller

Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio

rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1

Tajvano – CHO Chaoming

12F2, No. 41, Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung

rete : cmcho@so-net.net.tw

Ukrainio – Andreo JANKOVSKIJ

str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio

rete : classs@bigmir.net, telefono : 380 67 99 470 03

Usono – Brandon SOWERS

PO Box 52731, Atlanta, GA, 30355, Usono

nigrakajrugxa@gmail.com

Sendu ĉekojn al la indikita adreso

Aliaj landoj

SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio

rete (ĝenerala retadreso) : kontakto@satesperanto.org

rete (pri financaĵoj) : financoj@satesperanto.org

Tel: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC : PSSTFRPPPAR

eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s

aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal : financoj@satesperanto.org

Sennaciulo

Oficiala organo de SAT

Asocia sidejo de SAT

67 avenue Gambetta,

FR-75020 Paris, Francio

Retadreso: kontakto@satesperanto.org

Reĵeto: http://satesperanto.org

Tel: (+33) 09 53 50 99 58

Poŝtkonto:

SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: satx-s

Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Diana Riŝar

Kasisto: Bruno Henry

Membroj: Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz,

Dominiko Simeone

Sennaciulo

Redaktoskipaj kunordigantoj: Vinko Markovo, Pedro Sanz

Enpagaĝiganto: Nicolas Raymond

Ceteraj redaktantoj: Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina

Opulskienė, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo

Sir' kaj Franciska Toubale.

Kontribuojn sendu elektronike al:

sennaciulo.redaktejo@gmail.com

aŭ paperpoŝte al

SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,

FR-75013 Paris, Francio

Pri financaj aferoj sendu al:

financoj@satesperanto.org

Libromendojn sendu al:

libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al:

pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par/Presita de:

TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.

Aperas dumonate - Bimestriel.

Directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono:

France 39 €

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la

SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution:

N° CPPAP 05 20 G 86567

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> **Nura abono al Sennaciulo : 75% de la kotiz-prezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Aktiva membro pagas la planan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> Help- kaj grupmembroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

KOTIZOJ 2017

Lando	Jarkotizo	Lando	Jarkotizo
Argentino	24 €	Koreio	36 €
Aŭstralio	52 €	Kroatio	16 € (120 HRK)
Aŭstrio	52 €	Kubo	4 €
Barato	8 €	Latvio	16 €
Belgio	52 €	Litovio	16 €
Bosnio-Herc.	12 €	Luksemburgio	52 €
Brazilo	20 €	Madagaskaro	4 €
Britio	52 € (40 GBP)	Makedonio	12 €
Bulgario	12 €	Malio	4 €
Ĉeĥio	24 €	Mongolio	8 €
Ĉinio	8 € (56 CNY)	Meksiko	16 €
Danio	52 €	Nederlando	52 €
Estonio	16 €	Norvegio	52 €
Finnlando	52 €	Pollando	16 €
Francio	52 €	Portugalo	28 €
Germanio	52 €	Rumanio	12 €
Grekio	8 €	Rusio	16 €
Haitio	4 €	Serbio	12 €
Hispanio	40 €	Slovakio	16 €
Hungario	16 €	Slovenio	16 €
Irano	12 €	Svedio	52 €
Israelo	36 €	Svisio	52 € (64 CHF)
Islando	36 €	Tajvano	32 € (1160 TWD)
Italio	48 €	Turkio	16 € (52 TRY)
Japanio	52 € (6960 JPY)	Ukrainio	8 €
Kanado	52 € (80 CAD)	Usono	52 € (64 USD)
Kolombio	12 €		

DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €

30 | Sennaciulo | NOVEMBRO – DECEMBRO 2016

DONACINTOJ

Solidarkaso

KIKICHI Kazuja - 26,52 €

SAN-SEGUNDO-CORDERO Carmen - 4 €

LÓPEZ-HERNÁNDEZ Manuel - 14,63 €

MORITA Akira - 144 €

MARKOVO Vito - 8 €

RIBASOVA Marie - 320 €

BIURRUN Ricardo - 60,00 €

SAT-kunsido en Japanio

La 8an de oktobro okazis SAT-fakkunsido dum la 103a Japana Esperanto-Kongreso. Ĉeestis 13 personoj, inkluzive ne-membrojn de SAT.

La lasta japana peranto, k-do TANI Hiroyuki, forpasis en 2014, kaj poste la peranto-laboro ne funkciis dum preskaŭ 2 jaroj en Japanio. Nakamura, la nova peranto, pardonpetis pro tio kaj klarigis la refunkciigon de la peranto-laboro.

K-do Ho Song klarigis la preparon de la SAT-kongreso okazonta la jaron 2017 en Koreio. La kongresejo jam estas decidita, sed oni ankoraŭ ne komencis akcepti aliĝojn. Sed kelkaj ĉeestantoj jam konsentis partopreni en la kongreso.

K-do Miyazawa Naoto proponis kelkajn punktojn por aktivigi SAT-agadon en Japanio. Interalie kontribui per raportoj al *Sennaciulo*.



NAKAMURA DAISHIN

Vizito al Saĥaleno

De la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto, esperantistoj de Hokajdo (Japanio) vizitis Saĥalenon (Rusio) por propagandi Esperanton. Kvankam teritoria problemo troviĝas tie, 20 esperantistoj kaj interesatoj partoprenis en la kunveno. En la japana karavano estis kelkaj SAT-anoj kaj anarkiistoj, kiuj reklamis SAT-organon kaj venontan SAT-kongreson.

MIYAZAWA NAOTO



La liberpensula frakcio

Karaj sennaciuloj, mi kontaktos vin ĉar ni havas multe da laboro. Ni bezonas tradukantojn kaj membrojn kiuj verkos tekstojn.

Mi petas ĉiujn liberpensulojn de SAT ke ili sendu al mi raportojn pri la agadoj kiujn ili taksas utilaj.

La Liberpensula frakcio estas gravega por SAT. Ni ekzistas de la jaro 1921-a kaj havis bultenojn. Kamarado Gay eldonis bultenon en la jaroj 1950-aj kaj ni povus krei denove bultenon. Ni havas rilatojn kun ATEO, kiu eldonas ATEISMO-n.

Mi invitas ĉiujn liberpensulojn kontakti min:
dominique.simeone@yahoo.fr

DOMINIKO SIMEONE



**TAGON UNUAN:
KREAS LUMON**

**TAGON KVARAN: KREAS
LUMFONTON**

N° 13

Oktobro de 2011



Mangejo



Prelegejo

HORI Jasuo: Fukuŝima
GABORIT Pauline: Veganismo
MOERBEEK Rob: Stilfiguroj en Korea literatura



Termofonto de ruĝa akvo